

ESPERANTOLOGIO

ESPERANTO STUDIES

EES

Kajero 2

2001

Issue No. 2

Redaktas Editor

Christer Kiselman

Redakta komitato Editorial Board

Detlev Blanke	Koutny Ilona	Geraldo Mattos
José Borges Neto	Erich-Dieter Krause	Marc van Oostendorp
Probal Dasgupta	Sergej Kuznecov	Sergio Pokrovskij
Michel Duc Goninaz	Jouko Lindstedt	Humphrey Tonkin
Gotoo Hitosi	Liu Haitao	John C. Wells
Edmund Grimley Evans	Ingrid Maier	Yamasaki Seikô

Varna

Uppsala Universitato

Uppsala University

ISSN 1311-3496 (p)

ISSN 1404-4709 (e)

Presita en Bulgaro de / Printed in Bulgaria by

Color-Print

Varna 2001

ESPERANTOLOGIO / ESPERANTO STUDIES

EES

estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al Esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto.

Ni intencas publikigi proksimume unu kajeron en ĉiu jaro.

La revuo estos publikigata en du formoj, tamen enhave identaj: presita sur papero kaj rete alirebla.

La paperan version publikigas

Bambu Ltd
Poŝtkesto 405
BG-9000 Varna, Bulgario.
<bambu@mailroom.com>.

La prezo (inkludanta sendokostojn) estas 27 EUR por institucioj kaj 18 EUR por unuopuloj. Vi povas pagi al la konto bamb-i ĉe UEA; tiam informu Bambu Ltd ke vi pagis. (La unua kajero estas ankoraŭ havebla.)

La komputilreta versio estas publikigata de Upsala Universitato sub la respondeco de Ingrid Maier. Ĝi estas alirebla ĉe la retadreso

<http://www.math.uu.se/esperanto>

Por konservi la eblecojn de referenco la artikoloj publikigitaj en la retversio ne estos ŝanĝitaj dum la tempo de la nuna redaktoro. Sed ĉiu aŭtoro rajtas verki aldonajn notojn al sia jam publikigita artikolo. Tiuj aldonoj povos enhavi korektojn, komentojn kaj novajn referencojn.

is an international journal on all phenomena relating to Esperanto. It publishes articles based on original studies of the linguistic, historical, literary, psychological, sociological, and political aspects of Esperanto.

We plan to publish about one issue per year.

The journal is published in two versions, which are identical in content: a print version and an electronic version.

The print version is published by

Bambu Ltd
P. O. Box 405
BG-9000 Varna, Bulgaria.
<bambu@mailroom.com>.

The price (including postage) is 27 EUR for institutes and 18 EUR for individuals. Please contact Bambu Ltd for information on how to pay. (The first issue is still available.)

The electronic version is published by Uppsala University under the responsibility of Ingrid Maier. It is available at the URL

<http://www.math.uu.se/esperanto>

In the interest of scholars, the articles published in the electronic version will not be changed during the present editor's tenure. But every author may add an appendix to her or his published paper. Such appendices may contain corrections, comments, and new references.

ISSN 1311-3496 (p)

ISSN 1404-4749 (e)

ESPERANTOLOGIO

ESPERANTO STUDIES

EES

Kajero 2

2001

Issue No. 2

Enhavo / Contents

Christer Kiselman: Salutvorto de la redaktoro	3
Christer Kiselman: A word from the Editor	4
Heidi Goes: La Esperanto-movado en Tanzanio kaj Togolando	5–10
David Pardue: <i>Uma só língua, uma só bandeira, um só pastor:</i> Spiritism and Esperanto in Brazil	11–27
Walter Źelazny: Les idées sociales et religieuses suscitées par le phénomène des langues dites artificielles (aspect interlinguistique et social)	29–38
Liu Haitao: Gramatiko naskiĝas el tekstaro. Recenzo de verko de Christopher Gledhill	39–47
Ebbe Vilborg: Aperis ampleksa vortaro esperanta-germana. Recenzo de vortaro de Erich-Dieter Krause	49–52
Liu Haitao: Creoles or planned languages: which have the simpler grammar? Review of the doctoral dissertation of Anett Heil	53–57
Till Dahlenburg: Phraseologie unter der Lupe. Besprechung der Habilitationsschrift von Sabine Fiedler	58–64

La paperan version publikigas

Print version published by

Varna

La elektronikan version publikigas

Electronic version published by

Uppsala Universitato

Uppsala University

Konsiloj al aŭtoroj

Manuskriptojn verkitajn cele al publikigo en EES oni sendu al la redaktoro per komputilreta poŝto, prefere kiel T_EX-dosieron, ĉe

`<kiselman@math.uu.se>`.

Se tio ne eblas, sendu la tekston kiel ordinaran retpoŝtan leteron. Se ankaŭ tio ne eblas, tiam surpapere al:

Christer Kiselman
Uppsala universitato
Poŝtkesto 480
SE-751 06 Uppsala, Svedio.

Ĉiu artikolo estos submetita al juĝado de du spertuloj, kiuj restos nekonataj de la verkinto.

La bibliografio estu je la fino, kaj entekstaj referencoj al ĝi laŭ nomo, jaro kaj paĝnumero: Zamenhof (1929:365) aŭ (Zamenhof 1929:365) depende de la konteksto. La donitaĵoj aperu en la bibliografio tiel:

Wüster, Eugen

1955 La terminoj “esperantologio” kaj “interlingvistiko”. *Esperantologio* **1**, 209–214.

Zamenhof, L. L.

1929 *Originala verkaro. Antaŭparoloj – Gazetartikoloj – Traktaĵoj – Paroladoj – Leteroj – Poemoj*. Lepsiko/Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.

La sekvaj revuoj enhavas atentindajn konsilojn pri la preparado de manuskriptoj.

Canadian Journal of Linguistics, Style sheet, **41**(1) (1996), 83–94;
Revue canadienne de linguistique, Protocole de rédaction, **41**(1) (1996), 95–107;
<http://www.utpress.utoronto.ca/journal/CJL/cjl.htm>
Journal of Turkic Languages, Style sheet.

En T_EX piednotoj ne starigas problemon. Se vi verkas ne uzante T_EX, metu la piednotojn parenteze ĉe ilia origino. Escepto: se la notoj okupas pli ol kvaronon de la paĝo, metu ilin je la fino (aŭ reverku la tuton).

Guidelines for authors

Manuscripts intended for publication in EES should be sent to the editor by e-mail, preferably as a T_EX file, at

`<kiselman@math.uu.se>`.

If T_EX is not available to the author, then please send the text as a regular e-mail letter. If this is not technically possible, send the manuscript on paper to

Christer Kiselman
Uppsala University
P. O. Box 480
SE-751 06 Uppsala, Sweden.

The journal applies a strict refereeing system: every contribution is sent to two referees, whose identity will remain unknown to the author.

Put the bibliography at the end and refer to it in the text by name, year, and page number: Zamenhof (1929:365) or (Zamenhof 1929:365) depending on the context. Please give bibliographical details according to the following models:

The following journals give more detailed advice concerning the preparation of manuscripts.

In T_EX footnotes pose no problem. If you write not using T_EX, put footnotes as parentheses at their origin. However, if the notes occupy more than a quarter of the page, put them at the end (or rewrite).

ESPERANTOLOGIO / ESPERANTO STUDIES

EES

Redaktoro / Editor

Christer KISELMAN, Uppsala University, Department of Mathematics, P. O. Box 480,
SE-751 06 Uppsala, Sweden. <kiselman@math.uu.se>

Redakta komitato / Editorial Board

Detlev BLANKE, Otto-Nagel-Straße 110, DE-12683 Berlin, Germany.
<blanke.gil@berlin.snafu.de>

José BORGES NETO, UFPR/Departamento de Lingüística, Rua Gen. Carneiro 460,
BR-80060-150 Curitiba, PR, Brasil. <borges@coruja.humanas.ufpr.br>

Probal DASGUPTA, University of Hyderabad, Centre for Applied Linguistics & Translation Studies,
P. O. Central University, IN-500046 Hyderabad, India. <pdgalts@uohyd.ernet.in>

Michel DUC GONINAZ, Val Saint-Georges, Chemin de l'Échelle, FR-13100 Aix-en-Provence, France

GOTOO Hitosi, Tohoku University, Faculty of Arts and Letters, Department of Linguistics, Sendai,
JP-981 Japan. <gothit@sal.tohoku.ac.jp>

Edmund T. GRIMLEY EVANS, St. John's College, Cambridge CB2 1TP, England.
<edmun.grimley-evans@cl.cam.ac.uk>

KOUTNY Ilona, Adam Mickiewicz Uniwersitato, Lingvistika Instituto, Międzychodzka 5,
PL-60-371 Poznań, Poland. <ikoutny@amu.edu.pl>

Erich-Dieter KRAUSE, Universität Leipzig, Ostasiatisches Institut, Schillerstraße 6, DE-04109 Leipzig,
Germany

Sergej KUZNECOV, Tverskaja 19-67, RU-103050 Moskva, Russian Federation.
<kuznecov@philol.msu.ru>

Jouko LINDSTEDT, Slavonic and Baltic Department, P. O. Box 4 (Vuorikatu 5 B), FI-00014 University
of Helsinki, Finland. <jouko.lindstedt@helsinki.fi>

LIU Haitao, Jisuanji Zhan, Qinghai Lu Chang, Xining, Qinghai, CN-810108, China.
<htliu@yeah.net>

Ingrid MAIER, Uppsala University, Department of Slavic Languages, P. O. Box 527, SE-751 20 Uppsala,
Sweden. <ingrid.maier@slaviska.uu.se>

Geraldo MATTOS, Rua João Motter, 98, BR-81210-260 Curitiba, PR, Brazil.
<mattos@super.com.br>

Marc VAN OOSTENDORP, Meertens Institut, Joan Muyskenweg 25, NL-1096 CJ Amsterdam, The
Netherlands. <marc@vanoostendorp.nl>

Sergio POKROVSKIJ, ul. Tereškova 28-32, RU-630090 Novosibirsk, Russian Federation.
<pok@iis.nsk.su>

Humphrey TONKIN, University of Hartford, Office of the President Emeritus, Mortensen Library,
West Hartford, CT 06117-1599, USA. <tonkin@mail.hartford.edu>

John C. WELLS, University College of London, Dept. of Phonetics and Linguistics, Gower Street,
London WC1E 6BT, England. <wells@phonetics.ucl.ac.uk>

YAMASAKI Seikô, JP-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, Japan.
<syama@dokkyo.ac.jp>

Salutvorto de la redaktoro

Christer KISELMAN

Kara leganto

Estas ĝojo prezenti al vi la duan kajeron de *Esperantologio*! Ĝi enhavas tri originalajn studojn kaj kvar recenzojn. El la studoj po unu estas en esperanto, la angla kaj la franca; el la recenzoj du estas en esperanto, unu en la angla kaj unu en la germana.

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1.

★

Heidi Goes faris detalan studon pri la esperantistoj en Tanzanio kaj Togolando en sia licencia disertaĵo prezentita en 1999 al la Universitato de Gento – ĝi ampleksas 156 paĝojn! Ĉi tie ŝi prezentas la plej interesajn trovaĵojn el tiu disertaĵo.

David Pardue profunde studis religion kaj la strebojn al lingva unueco en Brazilo kaj sciigas nin pri tio en zorge dokumentita artikolo.

Walter Ŝelazny, sociologo kiu laboras kaj en Francio kaj en Pollando, prezentas al ni siajn pensojn pri la sociaj kaj religiaj ideoj asociitaj al la fenomeno de la tiel nomataj artefaritaj lingvoj, metante ilin en vastan kulturscienca kaj sociologian kadron.

★

La recenzoj metas lumon sur kvar gravaj verkoj, kiuj aperis antaŭ nelonge.

Christopher Gledhill publikigis gramatikon de esperanto, kies specifaĵo estas ke ĝi baziĝas sur studo de korpuso. Liu Haitao recenzas la verkon en naŭpaĝa eseo.

Erich-Dieter Krause publikigis grandiozan vortaron en 1999. Ebbe Vilborg zorge pritraktas ĝiajn (grandajn) meritojn kaj (malgrandajn) mankojn en sia recenzo.

Anett Heil doktoriĝis en la Universitato de Rostock en 1998. Ŝia disertaĵo estas kompara studo pri gramatika redukto en francbazitaj kreolaj lingvoj kaj en planlingvoj. Liu Haitao recenzas ŝian verkon.

Finfine: Sabine Fiedler, jam konata de la legantoj de *Esperantologio* pro sia studo en la unua kajero, prezentis sian habilitigan disertaĵon al la Universitato de Lepsiko. Bazita sur ĝi ŝi publikigis libron pri frazeologio en planlingvoj. Ni aperigas recenzon verkitan de Till Dahlenburg.

★

Mi esperas ke vi ĝuos la legadon de tiuj ĉi artikoloj same multe kiel mi jam faris!

★

Mi sincere dankas al ĉiuj juĝlegantoj, kiuj zorge kaj malegoisme donis al la aŭtoroj el siaj spertoj, kaj tiel multe kontribuis al la kvalito de la kajero.

A word from the Editor

Christer KISELMAN

Dear reader:

It is a pleasure to present to you the second issue of *Esperanto Studies*! It contains three original studies and four reviews. Of the articles, there is one in each of the languages Esperanto, English, and French; of the reviews, there are two in Esperanto, and one each in English and German.

For the editorial policy of the journal, please see the first issue.

★

Heidi Goes carried out a detailed study of the Esperantists in Tanzania and Togo in her licentiate dissertation, presented in 1999 to the University of Gent – it comprises 156 pages! Her article in this issue presents the principal findings of her study.

David Pardue has studied religion and the attempts toward language unity in Brazil, where spiritism and Esperanto live in symbiosis, and the language serves as more than a proselytization tool. He offers us some of his insights in a carefully documented article.

Walter Żelazny, a sociologist who works both in France and Poland, presents to us his thoughts on the social and religious ideas associated with the phenomenon of so-called artificial languages, setting them in a broad cultural and sociological framework.

★

In the review section we want to draw your attention to four important recent studies.

Christopher Gledhill published a grammar of Esperanto, whose most notable characteristic is that it is based on an analysis of a corpus of the language. Liu Haitao reviews the book in a nine-page essay.

Erich-Dieter Krause published a magnificent dictionary in 1999. Ebbe Vilborg reviews thoroughly all its (great) virtues and (small) demerits.

Anett Heil received her Ph.D. from the University of Rostock in 1998. Her dissertation is a comparative study of grammar reduction in French-based Creole languages and planned languages. Liu Haitao reviews her work.

Finally, Sabine Fiedler, who is already known to the readers of *Esperanto Studies* for her contribution to the first issue, presented her habilitation thesis to the University of Leipzig and published a book based on it. The topic is phraseology in planned languages. Till Dahlenburg reviews the book.

★

I hope you will enjoy reading these articles as much as I did!

★

My sincere thanks go to the referees, who have painstakingly and selflessly contributed to the quality of this issue, sharing their insights with the authors.

La Esperanto-movado en Tanzanio kaj Togolando

Heidi GOES

Kvankam la afrika Esperanto-movado jam ekzistas dum kelkaj jardekoj, kaj ankaŭ estas pridebatata en la cetera movado, ĝis nun ne ekzistas fidindaj sociologiaj esploroj pri ĝi. Estas la celo de tiu ĉi artikolo vastigi la sciojn pri la strukturo de tiu ĉi juna movado kaj ĝiaj problemoj.¹ La donitaĵoj estas bazitaj sur demandaroj kiuj estis responditaj de esperantistoj en Tanzanio kaj Togolando en aŭgusto–septembro respektive decembro de 1998.

Mi elektis Tanzanion ĉar ĝi estis antaŭ kelkaj jaroj rigardata kiel la lando kun la plej forta movado en Orient-Afriko, kaj Togolandon ĉar ĝi estas nun rigardata kiel la lando kun unu el la plej fortaj Esperanto-movadoj en Afriko. Mi en ambaŭ landoj kontaktis kaj vizitis lokajn Esperanto-klubojn,² kaj petis la membrojn respondi al mia demandaro.

En preskaŭ ĉiuj kluboj la plimulto de la membroj estis (eternaj) komencantoj. Mi tamen difinis ilin kiel esperantistoj, ĉar ili mem nomas sin tiel, kaj jam uzas la lingvon, ekz. por renkonti eksterlandanojn. Kvankam oni certe povus plivastigi kelkajn donitaĵojn al aliaj afrikaj landoj, oni ne povas ĝeneraligi ĉiujn donitaĵojn al ĉiuj landoj de Afriko. Tion montras i.a. la fakto ke jam inter Tanzanio kaj Togolando videblas diferencoj.

Mi priskribas ĉi tie la aĝon, familian kaj profesian situacion de la esperantistoj, iliajn motivojn por eklerni la lingvon, kaj tion kion ili difinas kiel la problemojn de la movado en Afriko. La respondoj de la demandaroj³ unue konfirmis tion kio jam estis raportita en diversaj artikoloj de esperantistoj kiuj vojaĝis en Afriko, nome ke

¹Tiu ĉi artikolo estas bazita sur la esploro por mia disertaĵo *La Esperanto-movado en Afriko – kun speciala atento al Tanzanio kaj Togolando*, kiu aperis nederlandlingve maje de 1999 en la Universitato de Gento (Universiteit Gent), Belgio. Ĝi estis prezentita kiel parto de la postuloj por akiri la gradon de licenciulo en la fako *Afrikaj lingvoj kaj kulturoj*. Tio okazis sub la gvidado de prof. d-ro Jan Blommaert, prof. d-ro Luc François kaj prof. d-ro Marc van Oostendorp, kiujn mi volas ĉi tie danki pro iliaj helpo kaj komentoj.

²Mi povis kontakti la tanzaniajn klubojn kun la helpo de adreslisto ricevita de Hans Bakker, kaj la togolandaĵajn klubojn pere de Yao Afantchao, kiun mi renkontis en 1998 dum la 83-a Universala Kongreso en Montpeliero, kaj kiu dissendis mian leteron al la lokaj kluboj. Mi ŝatus elkore danki ilin ambaŭ por ilia grandega helpo dum mia esploro.

³La demandaro konsistis el 37 demandoj. La demandaro kiun mi uzis en Togolando iom malsimilas disde tiu kiun mi uzis en Tanzanio. Por tiu ĉi artikolo mi uzis la respondojn al la demandoj n-ro 1b, 8 kaj 9 de la ĝenerala parto, kaj n-ro 1 kaj 18 de la esperanta parto (vidu Goes 1999:140–148).

la afrikaj esperantistoj estas mezume pli junaj ol la eŭropaj esperantistoj. En 1968 la plej granda aĝkategorio de la membroj de la Esperanto-Asocio de Britujo (EAB) estis tiu inter 60 kaj 69 jaroj (23%) (Forster 1982:303), dum tiu en Tanzanio situas inter 30 kaj 34 jaroj (28,6%) kaj en Togolando inter 20 kaj 24 jaroj (32,7%) (vidu tabelon 1). La tabelo montras ankaŭ ke inter la afrikaj landoj ekzistas diferenco koncerne la aĝkategoriojn de la esperantistoj. En Tanzanio 62,8% de la esperantistoj estis en 1998 inter 25- kaj 39-jaraj, dum en Togolando plimulto (70,9%) estis inter 15- kaj 29-jaraj.

Tabelo 1. Naskiĝjaroj de la esperantistoj

<i>Naskiĝjaro</i>	<i>Tanzanio</i>		<i>Togolando</i>	
	<i>N</i>	<i>%</i>	<i>N</i>	<i>%</i>
1935–1939	1	2,9	–	–
1940–1944	–	–	–	–
1945–1949	2	5,7	–	–
1950–1954	3	8,6	1	1,8
1955–1959	5	14,3	5	9,1
1960–1964	6	17,1	3	5,5
1965–1969	10	28,6	5	9,1
1970–1974	6	17,1	12	21,8
1975–1979	1	2,9	18	32,7
1980–1984	1	2,9	9	16,4
1985–1989	–	–	2	3,6
<i>Sume</i>	35	100,1	55	100,0

Tiu ĉi ŝajne relative malgranda aĝdiferenco (se oni ĝin komparas kun Eŭropo) tamen havas grandajn konsekvencojn por aliaj karakterizaĵoj, kiel ekzemple por la profesia situacio. La plej granda grupo (47,3%) de la togolandaj esperantistoj en 1998 ankoraŭ lernis aŭ studis (vidu tabelon 2). En Tanzanio la plej granda grupo (25,7%) estas geinstruistoj.

Tabelo 2. Profesioj de la esperantistoj

<i>Profesio</i>	<i>Tanzanio</i>		<i>Togolando</i>	
	<i>N</i>	<i>%</i>	<i>N</i>	<i>%</i>
Lernanto/studanto	–	–	26	47,3
Instruisto	9	25,7	6	10,9
Terkulturisto	4	11,4	–	–
Komercisto	4	11,4	3	5,5
Terkulturo kaj komerco	1	2,9	–	–
Aliaj	15	42,9	18	32,7
Senlaborulo	1	2,9	2	3,6
Ne respondis	1	2,9	–	–
<i>Sume</i>	35	100,1	55	100,0

Alia granda diferenco inter la movado en Tanzanio kaj Togolando, kiu rezultas el la aĝdiferenco, estas la familia situacio (vidu tabelon 3).

Tabelo 3. Familia situacio: geedzeco kaj gepatreco

<i>Familia situacio</i>	<i>Tanzanio</i>		<i>Togolando</i>	
	<i>N</i>	<i>%</i>	<i>N</i>	<i>%</i>
Geedziĝis; kun infano(j)	25	71,4	13	23,6
Geedziĝis; sen infano	1	2,9	—	—
Ne geedziĝis; kun infano(j)	2	5,7	—	—
Ne geedziĝis; sen infano	7	20,0	42	76,4
<i>Sume</i>	35	100,0	55	100,0

El tiu ĉi tabelo evidentiĝas ke en 1998 en Tanzanio granda plimulto de la esperantistoj (74,3%) estis geedziĝinta, dum en Togolando pli ol tri kvaronoj de la esperantistoj (76,4%) ankoraŭ ne geedziĝis kaj ankaŭ ankoraŭ ne havis infanojn.

La motivoj kiujn la afrikanoj donas por eklerni Esperanton ege diverĝas. Tamen kelkaj motivoj estas donitaj multe pli ofte ol aliaj (vidu tabelon 4). Pro la fakto ke la plimulto donis pli ol unu motivon, la nombro de la menciitaj motivoj estas pli alta ol la nombro de la demanditaj esperantistoj. Tial du procentaĵoj estis kalkulitaj. Por la unua procentaĵo la sumo de la menciitaj motivoj egalas al 100%. Tiel oni konas la gravecon de unu motivo relative al ĉiuj menciitaj motivoj. La dua procentaĵo, kursive presita, estas kalkulita surbaze de la nombro de esperantistoj kiuj mencias tiun motivon. Tiel oni povas vidi ke 41,8% de la togolandaj esperantistoj mencias kiel unu el siaj motivoj la ekhavon de geamikoj aŭ gekorespondantoj eksterlandaj.

La plej ofte menciitaj motivoj en ambaŭ landoj estas de la sama tendenco. Plej gravas por la afrikaj esperantistoj la komunikado kun la mondo. Tio povas esti per korespondado kun geamikoj, aŭ kun eksterlandanoj aŭ alietnanoj kiuj vizitas iliajn landon aŭ urbon. Ankaŭ la ebleco por vojaĝi estas grava motivo por eklerni Esperanton. Tamen invito al universala aŭ alia kongreso tute ne estas evidenta, eĉ malpli evidenta ol fine de la okdekaj jaroj.⁴ Kelkaj esperas ke ili estos invitataj de korespondanto, aliaj jam trovas tre valora la vojaĝadon al aliaj partoj de la lando, okaze de nacia kongreso. La diferenco kun eŭropaj esperantistoj estas ke ili pli ofte lernas Esperanton por faciligi aŭ malplikostigi la vojaĝon, ne por ebligi la vojaĝon (vidu i.a. Forster 1982:337 kaj la manieron kiel oni promocias Esperanton en Eŭropo⁵).

Ankaŭ la fakto ke per Esperanto oni povas lerni ion estas por multaj demanditoj grava motivo. Tion montras ekzemple la fakto ke tiuj kursoj organizitaj de la Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando (TIETo-instituto) kiuj ne rilatas al la lingvo Esperanto estas juĝataj valoraj kaj sencohavaj. Ekzemple, en aŭgusto de 1998 Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE) venigis iun paroli pri naskiĝregulado dum seminario por kurs- kaj klubgvidantoj (Togbossi 1998). Aliaj esperantistoj lernis pere de la Esperanto-literaturo aferojn kiujn ili laŭ propraj vortoj “alie neniam estus lernintaj”.

Aliaj ofte menciitaj kaŭzoj por eklerni Esperanton estas la pacideo, la universaleco aŭ la neŭtraleco de la lingvo kaj la movado, aŭ simple ĉar oni trovas la lingvon

⁴En 1987 dek tri afrikanoj estis invitataj al la jubilea Universala Kongreso en Varsovio. Post kelkaj jaroj malaltiĝis la entuziasmo por tiu ĉi “ekzotaĵo” kaj do ankaŭ la financa helpo de okcidentaj esperantistoj por invitigi la afrikanojn.

⁵Pluraj esperantaj junular-asocioj en Eŭropo promocias la lingvon pere de broŝuroj en kiuj ili emfazas ke ĝi estas utila dum vojaĝoj eksterlande.

Tabelo 4. Motivoj por eklerni Esperanton

<i>Motivo</i>	<i>Tanzanio</i>			<i>Togolando</i>		
	<i>N</i>	<i>%</i>	<i>%</i>	<i>N</i>	<i>%</i>	<i>%</i>
Por akiri korespondantojn aŭ amikojn de aliaj etnoj aŭ landoj	7	15,9	20,0	23	21,9	41,8
Pro la ebleco paroli kun alilingvuloj, por sin komprenigi eksterlande	7	15,9	20,0	9	8,6	16,4
Komunikado kun la mondo i.a. ekonomie	9	20,5	25,7	3	2,9	5,5
Pro la ebleco vojaĝi/avantaĝe kiam oni vojaĝas	1	2,3	2,9	12	11,4	21,8
Por lerni pri aliaj landoj/kulturoj, kompreni aferojn de la mondo	4	9,1	11,4	8	7,6	14,5
Por koni unu plian lingvon, interesiĝo pri lingvoj	2	4,5	5,7	10	9,5	18,2
Pro la facileco	4	9,1	11,4	6	5,7	10,9
Pro la neŭtraleco	2	4,5	5,7	9	8,6	16,4
Kunlaborado al la paco/pacideo	3	6,8	8,6	5	4,8	9,1
Pro interesiĝo/scivolemo	1	2,3	2,9	9	8,6	16,4
Pro la internacieco, universaleco, promocio de la universala kulturo, por internaciigi	1	2,3	2,9	4	3,8	7,3
Estas senpage	—	—	—	2	1,9	3,6
Por fariĝi iun en la mondo, akiri diplomon	—	—	—	2	1,9	3,6
Ĉar ĝi estas pli internacia ol la angla	1	2,3	2,9	—	—	—
Por havi sekretan lingvon kun amikoj	1	2,3	2,9	—	—	—
Por lerni pli da lingvoj pere de Esperanto	1	2,3	2,9	—	—	—
Similas al mia eklezio	—	—	—	1	1,0	1,8
Por viziti kongresojn	—	—	—	1	1,0	1,8
Por larĝigi la horizonton	—	—	—	1	1,0	1,8
<i>Suma nombro de motivoj</i>	44	100,1		105	100,2	

pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. Sed la lernado de tiu ĉi lingvo, aŭ la organizado de la movado, ankaŭ en Afriko ne estas senproblema. Kiam oni demandas afrikajn esperantistojn, sekvas tuta listo da tre diversaj problemoj (vidu tabelon 5). Kvankam neniu problemo akiris tre altan procentaĵon, kelkaj problemoj estis menciitaj multe pli ofte ol aliaj. La plej ofte menciitaj problemoj en ambaŭ landoj koncernas mankon de mono kaj de libroj aŭ aliaj materialoj. El neformalaj konversacioj kaj intervjuoj montriĝis ke oni celas instruilojn kiel tabulojn, kreton, skribilojn, kajerojn, (prononcad)kasedojn aŭ videobendojn. En Tanzanio oni emfazas la mankon de instruistoj. Dume en Togolando oni pli ofte mencias ke mankas propagando por Esperanto. El la togolandaj esperantistoj 7,3% menciis la problemon pri la dependeco de Eŭropo por financa kaj alia subteno. Ke oni ne menciis tiun ĉi problemon en Tanzanio, ne signifas ke la movado tie estas sendependa. Verŝajne la problemo estis menciita en Togolando pro influo de la kongresa temo de la sesa TEK⁶ “Al memstarigo

⁶La sesa togolanda Esperanto-kongreso okazis de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 1998 en Assahoun.

Tabelo 5. Problemoj de la afrika Esperanto-movado

<i>Menciitaj problemoj de la movado</i>	<i>Fojoj menciitaj (N) kaj % da menciintoj</i>					
	<i>Tanzanio</i>			<i>Togolando</i>		
	<i>N</i>	<i>%</i>	<i>%</i>	<i>N</i>	<i>%</i>	<i>%</i>
Manko de mono en klubo/movado, malriĉeco	8	14,8	22,9	11	16,2	20
Dependa, ne memstara	—	—	—	4	5,9	7,3
Manko de libroj kaj aliaj materialoj	9	16,7	25,7	10	14,7	18,2
Ne sufiĉe da aŭ ne sufiĉe bona propagando, ne sufiĉe konata	3	5,6	8,6	8	11,8	14,5
Manko de instruistoj; nespertaj instruistoj	6	11,1	17,1	—	—	—
Manko de kontakto kun la nacia asocio (TEA/UTE)	2	3,7	5,7	3	4,4	5,5
Estas neglektita, ĉar ĝi ne estas lingvo de iu lando, la neŭtraleco	1	1,9	2,9	3	4,4	5,5
Familiaj problemoj, tro da mastrumtaskoj	3	5,6	8,6	—	—	—
Senpova TEA-estraro	3	5,6	8,6	—	—	—
Ne estas E-lernejoj aŭ E-kursoj en la lernejo	1	1,9	2,9	2	2,9	3,6
Esperanto povas esti akceptata en Afriko nur kiam la evoluintaj landoj/Eŭropo/UN rekonas ĝin	—	—	—	3	4,4	5,5
Afriko ne estas reprezentita en UEA	2	3,7	5,7	—	—	—
Kursoj kun alta nivelo ĉiam okazas ekster Afriko	2	3,7	5,7	—	—	—
Manko de informoj	—	—	—	2	2,9	3,6
Ne konstantaj esperantistoj, manko de homoj	—	—	—	2	2,9	3,6
Rasismo ankaŭ en la movado	—	—	—	2	2,9	3,6
Tro eŭropeca	—	—	—	2	2,9	3,6
Kontraŭlaboro/malbona volo de la registaro	—	—	—	2	2,9	3,6
Indiferento de la registaro	2	3,7	5,7	—	—	—
Indiferento de la fortaj islamaj ŝtatoj	—	—	—	2	2,9	3,6
Indiferento de UN	—	—	—	1	1,5	1,8
Manko de kunvenejo	1	1,9	2,9	1	1,5	1,8
Manko de tempo	1	1,9	2,9	1	1,5	1,8
La movado ne estas sufiĉe forta	1	1,9	2,9	1	1,5	1,8
Tro malrapida agnosko	1	1,9	2,9	—	—	—
Malbona rilato al Unesko, malgraŭ tio kion oni diras	1	1,9	2,9	—	—	—
La eterna komencantoj	—	—	—	1	1,5	1,8
Hipokriteco de Esperanto-gvidantoj	—	—	—	1	1,5	1,8
Manko de sociala Esperanta helpocentro	—	—	—	1	1,5	1,8
UEA ne estas sufiĉe proksima al la naciaj E-asocioj	1	1,9	2,9	—	—	—
Esperantistoj vivas tro dise unu de la alia	1	1,9	2,9	—	—	—
Esperantistoj estas tro junaj	—	—	—	1	1,5	1,8
Envio inter la membroj	—	—	—	1	1,5	1,8
Estas rigardata kiel religio	1	1,9	2,9	1	1,5	1,8
Lernantoj ne volas lerni ĝin ĉar ili timas forgesi aliajn lecionojn	—	—	—	2	2,9	3,6
(Lingvistike) malfacila prononcado	2	3,7	5,7	—	—	—
(Lingvistika) manko de afrikaj vortoj en Esperanto	2	3,7	5,7	—	—	—
<i>Suma nombro de menciitaj problemoj</i>	54	100,6		68	100,0	

de la togolanda movado”, ĉar multaj respondis al la demandaro dum tiu kongreso. En Tanzanio oni menciis du specojn de problemoj pri la estraro de la Tanzania Esperanto Asocio (TEA), nome ke maloftegas la kontaktoj kun ĝi, kaj ĝia senpoveco.

La aliaj problemoj estis menciitaj de nur unu ĝis tri homoj, sed tamen estas aliaj homoj kiuj samopinias. La plendo ke la esperantistoj en Tanzanio vivas tro dise por ekzerci aŭ regule sekvi kurson estis esprimita ankaŭ en kelkaj konversacioj. En diversaj intervjuoj oni menciis ke Esperanto estas rigardata de ne-esperantistoj kiel religio, sed ankaŭ kiel movado “kontraŭ Jesuo”. Tio estas rigardata de la esperantistoj kiel problemo por disvastigi Esperanton en Afriko.

Konkludo

Oni povas konkludi ke en ambaŭ landoj la Esperanto-movado estas precipe afero de junaj plenkreskuloj, malkiel en Eŭropo. Tiuj ĉi afrikanoj estis antaŭ ĉio motivitaj por eklerni la lingvon kiel (neŭtralan) ilon por komuniki kun la mondo ekster ilia vilaĝo aŭ urbo, kaj por plulerni ion pere de ĝi. La movado estas dinamika, sed malrapide kreskas pro la multaj malfacilaĵoj, ĉe kiuj oni spertas la mankon de mono kaj materialo kiel unu el la plej gravaj problemoj. Aliaj aspektoj de la nuna kaj antaŭa afrika movado kaj superrigardo de la diskutoj ene de la estraroj de UEA kaj TEJO pri la afrika movado estas troveblaj en Goes (1999). Tamen restas aliaj esplorindaj aferoj, kiel la diferenco inter Esperanto kiel hobia kaj aliaj hobiaj en Afriko. Ĉu ĉiuj hobiaj/movadoj tie havas la saman membrostrukturon, la samajn problemojn kiel la Esperanto-movado? Kiel ili estas solvataj en ne-esperantaj kluboj? Kiel oni povus solvi la problemoj de la afrika Esperanto-movado? Kiu estas la vivopovo de la afrika movado? Kiuj estas la eblaj sekvoj de ĝia plua disvastiĝo en Afriko?

Bibliografio

Forster, Peter G.

1982 *The Esperanto Movement*. Hago: Mouton Publishers.

Goes, Heidi

1999 *De Esperanto-beweging in Afrika – met bijzondere aandacht voor Tanzania en Togo*. Gento: propra eldono. 156 pp.

Togbossi, Yao

1998 Brila aŭgusto por Togolando. *Esperanto*, n-ro 11, p. 190.

Heidi Goes naskiĝis en Oostende, Belgio, en la jaro 1976. Ŝi esperantiĝis en 1990. Post la mezgrada lernejo ŝi loĝis dum preskaŭ unu jaro en Indonezio kadre de la studenta interŝanĝprogramo de *Associated Field Service* (AFS, antaŭe *American Field Service*). Poste ŝi dum kvar jaroj studis la fakon *Afrikaj lingvoj kaj kulturoj* en la universitato de Gento. En 1997 ŝi patrinigis kaj nomis sian filon Robin. Ŝi nun studas la unujaran fakon *Evolukunlaborado* en la sama universitato.

Adreso de la aŭtorino: Groeningestraat 21, BE-8460 Oudenburg, Belgio

Retadreso: goes.heidi@mailcity.com

Uma só língua, uma só bandeira, um só pastor: Spiritism and Esperanto in Brazil

David PARDUE

1. Introduction

Humankind has perennially attempted to recover—or construct—a utopian language, shared by all, which would unify us into a single family, thereby diminishing political and religious strife. Long before the time of Jesus, the prophet Zephaniah anticipated a messenger who would bring us a pure language so that we could better serve God (3:9). Various religious groups, such as the Bahá'í Faith, the Ōmoto-kyō religion in Japan and Wŏn Buddhism in Korea, believe in the need for a universal language, or support the adoption of an international auxiliary language. In this study I explore the beliefs of a group in Brazil, the Spiritists (Kardecists), who with great faith have embraced Esperanto as the solution to this language problem. Although it is not the central tenet of their religion, the connection between Brazilian Spiritism and Esperanto provides a textbook case of symbiosis, in which the language serves as more than a proselytization tool. I intend to present the most important texts on this topic from the vast corpus of Spiritist literature, and will propose some interpretations as to how this relationship might have developed.

1.1. Principal Characteristics of Spiritism

Before examining the texts, I think it necessary to provide some background on Kardecism, since it has received relatively little scholarly attention—unlike its Afro-Brazilian relatives, the *candomblé* and *umbanda* movements.¹ I am employing Hess's definition of Brazilian Spiritism as the movement identified with the writings of Allan

¹ *Umbanda* spiritism is a synthesis of Afro-Brazilian religions and Kardecism which first appeared in the 1920s. Although many sects exist within *umbanda*, it is primarily a religion of the less educated, urban lower classes in which white magic is ever present. *Umbanda* recognizes not only the saints of the Catholic Church but also *orixás* (Yoruba deities), and accepts the spirits of *pretos velhos* ('old blacks'), *caboclos* (Amerindian spirits) and *exús* (trickster Yoruba spirits). The religion has no organized movement as a whole, so practice varies widely from center to center. Most Spiritist intellectuals draw a sharp distinction between their own movement and philosophy and those of *umbanda* and *candomblé* (Hess 1994:15). In fact, the Kardecists openly attacked *umbanda* as "an inferior African fetichistic cult" until their great spirit guide Emmanuel, through medium F. C. Xavier, told them in 1953 that "The work of Umbanda, when oriented towards charity, is also laudable" (qtd. in McGregor 1966: 210–211). For more information, see Hess (1994: 17, table 1); Hess (1991b: 14–15); Bastide (1967); McGregor (1966: 160–220); and Oliver (1998).

Kardec (1987: 15). Allan Kardec is the pseudonym of Hippolyte Léon Denizard Rivail (1804–1869), who was born a Catholic in Lyon, France, but educated in Protestant Switzerland under the famous pedagogue Pestalozzi. After completing training as a teacher, Rivail returned to France, where he taught French, mathematics and sciences at various schools.

Around the years 1854–55 the “talking table” fad swept through the salons of Europe, and Rivail—who had previously studied phenomena such as hypnotism, sleepwalking and clairvoyance—began investigating the occurrences, although most participants were interested in these “spiritual phenomena” only for frivolous reasons. At the outset, Kardec was skeptical. He did not envision creating the foundation of a spiritist religion but simply wanted to verify whether the phenomena were authentic. Being neither a mystic nor a medium himself but a man of science, Rivail turned the parlor games into serious study sessions; for more than a year, he posed questions to the spirits, gathering data from multiple sources and checking answers collected through one medium with those from another (McGregor 1966: 108).

The result of his work was *Le livre des esprits* (1857), which by the time of its twenty-second and definitive edition, collated 1,019 answers to questions Kardec directed to the spirits. Kardec systematically organized the answers which he received from many different spirits. He concluded that the spirits are not gods, nor are they infallible; rather, “as souls of men, the spirits did not have complete wisdom or science, that their knowledge was limited to their degree of advancement and that their opinions had the value of personal opinions only” (qtd. in McGregor 1966: 109). Kardec hypothesized that there are various classes of spirits which are unequal in power, intelligence, wisdom or morality (1983: introd., sect. 6, x–xi).

Thereafter followed the other four works which make up the *codificação* (‘codification,’ as the Brazilian Spiritists call it): his “scientific” texts, *Le livre des médiums* (1861) and *La Genèse, les miracles et les predictions* (1868); and his “moral-religious” texts, *L’Évangile selon le spiritisme* (1864) and *Le ciel et l’enfer* (1865) (Hess 1987: 30n4).

Kardecism today is a religion, science and philosophy. Kardec himself did not consider spiritism a religion but rather a philosophy rooted in science that has a Christian moral basis (Hess 1991b: 16; 1994: 79). He viewed spiritism as the product of the Spirits’ teachings, as something continuously evolving, not as the immutable fruit of his personal revelation. Kardec advocated reason and open-mindedness, and his system encourages the empirical validation of its claims.

Kardecism was introduced into Brazil in the mid-nineteenth century (for further information, see Hess 1987; Machado 1983; and McGregor 1966: 86–102). After establishing itself, it took on a religious character and in fact possesses the elements of a religion: a founder; an organized church with unified ritual (Bastide 1967: 6–7); and a unified philosophy (based on the *codificação*). As Spiritism is a complex system, it is impossible to present an in-depth analysis of its beliefs here. However, I will briefly summarize some of its basic tenets. Spiritists believe in the existence of the “perispirit,” a semimaterial body which unites the spirit to the physical body. They believe that communication with discarnate human spirits is possible via spirit mediums. Through the mechanism of reincarnation, we intellectually and morally progress towards perfection—this progression is governed by the law of karma. Spiriti-

tists also accept the phenomenon of healing through spiritual energies (hence we have practices such as the *passe* [‘pass, laying-on of hands’], *desobsessão* and *médiums receitistas* [‘homeopathic mediums’]).² As Christian charity is considered the supreme virtue, the Kardecists perform many charitable activities: they operate hospitals and dental clinics for the poor, food pantries, orphanages, nursing homes, vocational schools and shelters for the homeless. These services are typically provided free of charge. The Spiritists’ fundamental credo is “Fora da caridade não há salvação” (‘Without charity there is no salvation’). Although Bastide notes that such Spiritist institutions are in part a means of proselytism, he believes that primarily “Elles [i.e., ces institutions] sont la preuve que le spiritisme est une foi vivante, tournée vers l’amour du prochain” (1967: 7). Great emphasis is placed on moral and spiritual improvement through study of the codification, as well as Francisco Cândido “Chico” Xavier’s writings (McGregor 1966: 213).

Spiritism has faced the hostility both of Brazil’s mushrooming Protestant sector and of the Catholic Church. In part this is because Kardecism rejects some basic Christian tenets, such as the trinitarian concept of God, the divinity of Christ (although Jesus is regarded as the spiritual leader of Earth and the guide and model for all humanity), the divine nature of miracles, the physical reality of heaven and hell (Kardec believed they are simply psychological states created by the mind), and the existence of angels and demons (Hess 1991b: 17). One of the religion’s most vocal critics is Franciscan theologian Boaventura Kloppenburg, who spearheaded an antispiritist campaign in the late 1950s and early 1960s. He argues that Spiritism is “necromancy and magic” practiced by uneducated people who “are not qualified to distinguish the truth from error” (1967: 771; for further criticism, see Itioka 1988: 101–140 and Santiago 1986).

Unlike the practitioners of *umbanda*, who tend to be working-class mulattoes or blacks, Bastide reported that adherents of Spiritism are predominantly white, conservative urbanites who are middle-class (1967: 8–9). Hess contends that although this statement is largely true, it cannot be reduced to a simple formula because there is tremendous variation in ethnic and class membership among Spiritist centers (1987: 16). He points out the long history of internal splits within the Brazilian movement over the issue of Spiritism-as-religion versus Spiritism-as-science (1987: 16; 1991b: 18–19; 191–199). Those with college educations (such as physicians, lawyers, engineers) tend to be more interested in the scientific side of Spiritism—e.g., psychical research—and chiefly study *The Spirits’ Book* and *The Mediums’ Book*. The non-intellectuals, who comprise the vast majority of the movement, focus more upon the day-to-day charitable activities of the Spiritist centers; they emphasize *The Gospel according to Spiritism* and the evangelical works by the spirits Emmanuel and André Luiz, such as *Há dois mil anos, Paulo e Estêvão* and *Nosso lar* (Hess 1994: 12).

²For additional information, see Kardec (1983: introd., sect. 6, ix–xiv); Cavalcanti (1990); Hess (1991b: 15–16); Negrão (1987: 260). *Receitista* mediumship is primarily a phenomenon of the first decades of the twentieth century (Hess 1987: 19). One of the anonymous readers who evaluated this article points out that now all Spiritist centers which belong to the state-level federations do this type of homeopathic prescription only if there is a legally licensed physician nearby.

Accurate data on the number of Kardecists in Brazil is difficult to find, and its validity is subject to question. The *Statistical Abstract of Latin America*, using figures from the 1990 census, reports the total population of Brazil as 150,368,000; of that number, 4.8 percent—7,217,664—are classified as “Spiritist” (Wilkie 1999: 335). (However, this category includes practitioners of *candomblé*). The most recent volume of the *Anuário estatístico do Brasil* which I have been able to consult gives a figure of 1,538,230—based on a sample of 1980 census data (1989: 72). Maust cites two sources: W. Robert McAlister, a Pentecostal bishop, estimates the figure at 30 million but says the true number is likely to be much higher; C. Wesley King, director of the Free Methodist Seminary of São Paulo, estimates that up to half of the Brazilian population is connected in some way to Spiritism (1985: 48). (Note that these two informants include all non-Christian groups in their counts: Kardecism, *umbanda* and *candomblé*).

These statistics exhibit such wild variability for several reasons. Many Spiritists also declare themselves to be Catholics, especially for social purposes such as christenings, marriages and funerals (Negrão 1987: 261). Indeed, Ludwig remarks that historically *umbanda* has not been recognized by the census as a separate religious denomination, and therefore *umbandistas* are officially listed as Roman Catholic (1985: 38). It is not unusual for people identifying themselves as Catholic to participate occasionally in Spiritist sessions, especially if they are seeking help for a sick relative or desire other sorts of consolation. Spiritists may choose to remain uncounted because they wish to avoid backlash from Christian evangelicals or even from fellow Esperantists. As one member of the “Spirito” list observed, Esperantists are always welcome in Spiritist circles, but the converse is not always true; some intolerant Esperantists ridicule Spiritists for their beliefs.³

To avoid conveying the misimpression that Spiritists are persecuted because of their religion, it bears stating that all but a small percentage of Brazilians have a tolerant attitude towards these movements. Brazilians have been able to easily reconcile the contradiction between rationality and Spiritism; for example, Jorge Amado belonged to both the Communist Party and a *candomblé* temple. Carpenter observes that an essential element of Brazil is its “pluralistic religious culture characterized by porous boundaries between distinct traditions, by a tolerance of diversity, and by a predisposition towards experimentation and innovation” (1999: 243–244). Sociologist Pedro Ribeiro de Oliveira has documented the widespread incidence of multiple religious affiliation among the Brazilian population. He presents the improbable but true example of Dona Maria, a respondent he met while conducting census work in the interior of São Paulo state. When questioned about her religious life, Maria recounted how she was born a Catholic but converted to Pentecostalism after becoming a widow. Beset by persistent splitting headaches, she sought relief through Spiritist healing sessions, although she said that if she were completely cured, God willing, she would return to Catholicism (1977: 557–558).

³“Spirito” is an Esperanto mailing list devoted to discussion of Spiritist principles as formulated by Allan Kardec, the diffusion of Spiritism outside Brazil and related topics. For information on how to subscribe, consult <http://groups.yahoo.com/group/spirito>.

Anyone who investigates Spiritism in Brazil quickly learns the importance played by the book in spreading their message and serving as a guide to the faithful (Carmargo 1961:121–123). There is a huge corpus of Spiritist literature, much of which is in the form of “psychographed” texts written by spirits via spirit mediums. As Hess observes, there is a wide variety of genres represented: scientific, political and historical texts; novels; poetry as well as devotional literature (1991a:219). Often, this literature consists of the stories of spirits whose variety of experiences through successive incarnations can serve as an example, warning or encouragement to the reader. Such literature tends to be overlooked by scholars because it falls between the cracks of literary studies, which brand the texts as too “popular,” while anthropology and folklore consider that they are too “middle-class” and “elite” (Hess 1991a:220). In the next two sections of this article, we will delve into this corpus to examine several Spiritist texts relating to universal language.

2. Spiritism and Universal Language

The Esperanto movement in Brazil—one of the world’s largest—receives much of its support from Spiritist groups, which actively promote the learning and use of the *internacia lingvo*. The germ of this project was a tangential observation by anthropologist David Hess that the Kardecists believe their doctrine holds universal appeal, but are aware of Portuguese’s marginalized status among European languages; therefore, they regard Esperanto as an excellent vehicle for conveying their Spiritist-Christian message (1991b:189). I am indebted to him for sparking my initial curiosity, but my research indicates that this statement is only partially correct.

The actual situation within the Spiritist community is more fluid, and I propose that there is not a single reason but a variety of interrelated ones: partly doctrinal, partly from evidence in spirit communications as well as from the efforts of pioneering Spiritist-Esperantists such as Ismael Gomes Braga, Francisco Valdomiro Lorenz and Porto Carreiro Neto. The Spiritists believe that their doctrine and Esperanto complement each other, and that both play a role in the divine plan for Earth’s progressive transformation.

A reasonable point of departure is to see what relational basis exists in the *codificação*. In *Le livre des esprits*, we learn that one day Spiritism will become the world’s common creed, and that it will mark a new era in human history:

Certainement, il [i.e., le spiritisme] deviendra une croyance vulgaire, et il marquera une nouvelle ère dans l’histoire de l’humanité, parce qu’il est dans la nature et que le temps est venu où il doit prendre rang parmi les connaissances humaines . . . (Kardec 1983: bk. 3, ch. 8, question no. 798, 356).⁴

In the foreword to this same work, Kardec cites the words of the higher spirits, who gave him the mission of writing the book:

“Occupe-toi avec zèle et persévérance du travail que tu as entrepris avec notre concours, car ce travail est le nôtre. Nous y avons posé les bases du nouvel édifice qui

⁴“It [Spiritism] will certainly become the general belief, and will mark a new era in the history of the human race, because it belongs to the natural order of things, and because the time has come for it to be ranked among the branches of human knowledge . . . ” (Kardec 1976:309)

s'élève et doit un jour réunir tous les hommes dans un même sentiment d'amour et de charité . . . ” (1983:xxxiii).⁵

In *La Genèse*, chapter 17 is entitled “Predictions of the Gospel”; item numbers 31 and 32 recall the text of John 10:16, which states: “And there are other sheep I have that are not of this fold, and I must lead these too. They too will listen to my voice, and there will be only one flock, one shepherd” (1999:1222). The spirits’ responses interpret the biblical text to mean that not only will there be religious unity but linguistic unity as well:

Cependant, l'unité se fera en religion comme elle tend à se faire socialement, politiquement, commercialement, par l'abaissement des barrières qui séparent les peuples, par l'assimilation des mœurs, des usages, du langage; les peuples du monde entier fraternisent déjà, comme ceux des provinces d'un même empire; on pressent cette unité, on la désire. (Kardec 1980:215)

Another piece of evidence which is often cited in Spiritist writings is a communication from the spirit Éraсте, “De l'origine du langage,” which was published in the November 1862 issue of *La revue spirite*. According to this highly evolved messenger, language is a gift from God. It has evolved progressively throughout the three great periods in human history: the barbarous phase; the Hebraic or pagan phase (when slavery was sanctioned by Jehovah, who also demanded sacrificial victims); and the Christian phase. Thus one can gauge how civilized a people is by how rich its language is (352). In the fourth great period of history, the “grande période spirite,” there will be one common language:

Ce que je peux ajouter, c'est que l'humanité marche à une langue unique, conséquence forcée d'une communauté d'idées en morale, en politique, et surtout en religion. Telle sera l'œuvre de la philosophie nouvelle, le Spiritisme, que nous vous enseignons aujourd'hui. (Éraсте 1862:352)

2.1. Spiritism, Esperanto and the *Interna Ideo*

Although Esperanto is not specifically mentioned in the texts above, Spiritists believe that their religion cannot spread on a worldwide scale without Esperanto's collaboration. According to Kardec, spirits continually progress toward perfection, and virtues which make such evolution possible include love for one another, altruism, acquiring knowledge, mutual respect, community, friendship and tolerance. Therefore we should not be surprised that Spiritists acknowledge the common ground between their ecumenism and the *interna ideo*. Esperanto and the Spiritist value system dovetail because of their attempts to promote peace as well as greater harmony in earthly relations.

Just as Zamenhof addressed himself to idealists, people who were capable of taking the long view rather than a short-term, selfish perspective, campaigners such as Ismael Gomes Braga did likewise. In one of his numerous articles promoting Esperanto, Braga wrote that although only God knows when the language's final victory will occur, it has partially triumphed because the most studious and forward-

⁵ “Be zealous and persevering in the work you have undertaken in conjunction with us, for this work is ours. In the book you are to write, we shall lay the foundations of the new edifice which is destined to unite all men in a common sentiment of love and charity . . . ” (Kardec 1976:xlvihi)

thinking people have already learned the language of their own free will, unlike the masses who do only what they are required (1947b:182).⁶

1E. Le sennaciismo de E. Lanti, issu de l'espéranto, était la doctrine la plus courageuse et la plus radicale possible au niveau idéologique. Lanti n'avait pas de scrupule national, étatique ou même sur le plan de la bataille des classes sociales. Si on doit construire un monde juste, on doit faire disparaître les idées de nation et d'état. Cette construction est possible par la lutte des classes où le prolétaire prend en mains toutes les armes, y compris l'espéranto, seule langue juste qui n'est pas instrument de domination culturelle et nationale de la bourgeoisie. Lanti provoque le plus grand schisme idéologique au sein du mouvement espérantiste dans son histoire.

1C, 2B, 2C et 3E. Quatre « systèmes » religieux développent la nécessité d'une langue internationale, voire universelle, pour l'harmonie religieuse du monde : le spiritisme d'Allan Kardec (1804–1869), l'hilelismo et l'homaranismo de Zamenhof, l'Oomoto et le Bahā'isme. Mais c'est uniquement dans les deux derniers cas que cette possibilité fait l'objet d'une révélation divine. Selon les plus importants prophètes-disciples de Deguchi (né 1871) et 'Abd al-Bahā (1844–1921), le Dieu désire une langue internationale mais sans préciser que cette langue soit espéranto. Deguchi et al-Bahā ont conclu que l'espéranto pouvait être cette langue. Par contre le spiritisme de Kardec n'était pas révélé, mais il se manifestait par son raisonnement purement rationnel et moral : « ... l'humanité marche à une langue unique, conséquence forcée d'une communauté d'idées en morale, en politique, et surtout en religion. » (L'esprit Érase, cité ici d'après Pardue 2001 : 16.) Mais Kardec était mort avant même le lancement du Volapük (1879), donc sa langue unique n'était pas encore le produit intellectuel d'une pensée interlinguistique de l'époque. Pourtant à notre époque, plusieurs spiritistes brésiliens, disciples de Kardec, parmi les plus célèbres Ismael Gomes Braga et Francisco Cândido Xavier, ont conclu que l'espéranto pouvait et même devait être cette langue. Aussi l'homaranismo n'était pas révélé, mais il se manifestait par sa démonstration de puissance morale et son respect pour la tolérance religieuse. Dès le début Zamenhof explique que la langue de leur système religieux ne peut être autre que l'espéranto. Les Bahā'istes continuent à honorer l'espéranto mais utilisent plutôt l'anglais.

3B et 3C. Jerzy Korytkowski pour l'église catholique et Detlev Blanke, S. N. Podkaminer pour le marxisme et plusieurs autres pour les systèmes religieux ou sociaux à vocation universelle ont prouvé qu'une langue internationale de type espéranto n'est pas ennemi de l'église ou du marxisme, mais au contraire absolument cohérente avec les systèmes donnés et même utile et nécessaire.

3D. Dans les années soixante on observe plusieurs mouvements de jeunes qui sont plusieurs formes de contestation de la société occidentale. D'abord les mouvements anticolonialiste, puis pacifiste (la guerre de Viêt-nam) et enfin écologiste. Sur la base de ces mouvements contestataires, la jeunesse espérantiste (Giorgio Silfer, Jouko Lindstedt) lance le Manifeste de Rauma.² C'est la première fois que l'espéranto est proclamé comme valeur en elle-même. Le plus important mouvement d'étudiants espérantistes dans l'histoire de l'espéranto – le Comité espérantiste des étudiants polonais³ – signe ce Manifeste et s'éloigne du mouvement officiel.

4B. Ce ne sont pas uniquement les doctrines nationalistes extrémistes qui s'opposent à une langue internationale dite artificielle. La doctrine jacobine de la République française, bien qu'éloignée de l'accusation de chauvinisme, est un exemple parmi

²Du nom d'une petite ville de Finlande où ce Manifeste a été proclamé.

³PSEK, Pola Studenta Esperanto-Komitato.

d'autres démontrant que l'on n'a pas besoin être extrémiste pour lutter contre toute manifestation pour une langue internationale autre que la langue française.

4C et 4D. Il existe une liaison subtile entre l'école International Auxiliary Language Association (IALA) d'Alexander Gode et le marxisme-stalinisme dans l'interlinguistique. L'école de Gode et celle de Staline expliquent la même conviction, à savoir qu'une langue internationale peut se manifester uniquement dans une voie évolutionniste. Gode indiquait cette voie par la création de l'interlingua IALA. Staline fut cette fois un peu plus prudent : il expliqua sa conviction en disant qu'une langue internationale n'est possible que sur la base d'une ou plusieurs langues du prolétaire refondues ensemble pour ce but. Mais Gode n'était pas plus original que Staline parce qu'il pensait que l'interlingua ne peut pas posséder dans son vocabulaire certains mots qui seraient étrangers à la pensée européenne. Ce fut le motif de conflit entre Gode et André Martinet, célèbre linguiste français de dimension mondiale.

4E. On ne peut pas exclure que les réformistes de l'ido ont eu certainement raison de réformer l'espéranto à l'époque, pour se diriger vers un dialecte proche du français. Si les convictions interlinguistiques de Gode et Staline n'étaient pas acceptables au nom de l'humanisme en tant que tel, les différences entre Zamenhof et les réformistes avaient un caractère idéologique. Je pense que Christer Kiselman a raison lorsqu'il me dit : « je pense qu'ido couperait les racines yiddisch de l'espéranto alors que Zamenhof ne voulait pas les trancher, au moins à un niveau subconscient » (communication personnelle 2000 11 20).

De l'époque du modernisme à l'époque du postmodernisme

Dans le grand tableau ci-dessus, j'ai montré que le mouvement espérantiste a été mélangé dès le premier siècle de son existence à toutes sortes de discussions politiques, sociales et religieuses de l'époque. Ce mouvement a créé ses propres doctrines en commentant l'idée de «deuxième langue» pour chacun, idée qu'avait lancé Zamenhof. Mais Zamenhof avait également lancé presque en même temps les idées de l'hilelismo et de l'homaranismo. On peut supposer qu'un des motifs principaux pour lequel Zamenhof a arrêté toute discussion sur la réforme de l'espéranto fut la conviction que ces réformes auraient pu déséquilibrer le poids universel (tant lexical que grammatical) de l'espéranto. Par exemple l'ido, comme forme d'espéranto réformé, se manifeste, d'un point de vue linguistique, comme un dialecte plus facile à apprendre à partir de la langue française. On ne peut pas oublier qu'à l'époque, il existait encore un troisième motif pour créer une langue auxiliaire. Il était lié à la diaspora de la population juive. Indépendamment de Zamenhof on doit à deux personnages extraordinaires, Édmond Privat et Hector Hodler, une certaine originalité dans le mouvement ; ce sont eux qui trouvèrent pour l'espéranto les éléments forts d'un fédéralisme. Mais «le bâtisseur» de cette originalité est incontestablement Lanti qui a proclamé le sennaciismo, doctrine la plus fortement liée au phénomène de l'espéranto.

Dans la période du postmodernisme et de la mondialisation, aucune force pour l'instant n'a pu mettre en doute la position internationale de la langue anglaise (ou «américaine»). C'est une grande illusion de la France que de penser qu'elle peut conserver la position privilégiée de sa langue. Malgré la chute totale du français dans les relations internationales, Paris continue de mener la même politique linguistique que dans la période impériale, sans prendre en considération ce qui s'est déjà passé. Or la po-

litique linguistique mondiale d'hier de la France est maintenant exportée vers l'Union européenne. Les instructions officielles aux citoyens français précisent que la langue française doit être utilisée lors de ses contacts avec l'une des institutions de l'Union européenne : courrier, téléphone, télécopie, courrier électronique, etc.⁴ La France (ni aucun autre état) n'a jamais considéré sérieusement le problème interlinguistique, parce qu'elle n'a jamais été prête à renoncer à son chauvinisme linguistique. Si j'ai consacré un chapitre entier aux rapports de force linguistiques dans le monde, c'est pour dire qu'aujourd'hui c'est uniquement la France qui peut éventuellement limiter le marché sans pitié de la langue anglaise, marché qui provoque de grands dommages dans la vie intellectuelle. Actuellement, les sciences sociales sont sous une si grande pression de l'américanisation que mes collègues italiens, polonais ou ukrainiens et moi-même ne sommes pas capables d'expliquer les problèmes des minorités nationales sans faire référence à la sociologie américaine, qui n'a, elle, aucun rapport avec la situation européenne. J'en déduis donc que la France ne veut pas limiter la puissance de l'anglais, mais qu'elle veut encore essayer d'inverser le rapport de force linguistique mondial, ce qui est aujourd'hui impossible. D'ailleurs la position du français va encore diminuer lors de l'adhésion de nouveaux états à l'Union européenne. Dans ces circonstances, les politiciens et bureaucrates auront peut-être une « lumière interlinguistique » en devant repenser entièrement leur système de communication.

La lutte finale est perdue et les nouvelles valeurs de la civilisation sortent vainqueurs

Dans les deux cadres inférieurs, intitulés « finvenkismo » et « civito », je montre qu'actuellement l'espéranto peut être, au sens philosophique, simplement conservant biologique de l'idée de langue auxiliaire, si une telle chose est possible en ces termes. L'espéranto comme deuxième langue mondiale et deuxième langue individuelle était la grande illusion de la belle époque et, j'ajouterai même, une illusion noble, juste et humaine. Si les chefs des mouvements espérantistes tirent encore aujourd'hui profit de cette illusion, ils ne sont pas honnêtes vers le « peuple » espérantiste.

Pour l'instant l'espéranto conserve son rôle de langue au sein du groupe spécifique de la diaspora quasi-ethnique des mouvements culturels et sociaux de type 3.D qui, à l'inverse des autres groupes ethniques, se reproduisent uniquement par héritage culturel. Ce qui est un phénomène unique au monde et suffisant pour proclamer l'espéranto comme une valeur de notre civilisation, comme les militants de la Civito essayent de le faire.

Opinions et conclusions

- Le phénomène des langues dites artificielles est un phénomène historique du passé. On sait qu'il n'existe pas de limite dans la création des langues dites artificielles. Aujourd'hui c'est la langue anglaise qui a la fonction de langue internationale. La France a disposé des moyens nécessaires pour limiter l'influence de l'anglais (son prestige international, ses moyens financiers), mais à cause de son chauvinisme linguistique elle ne prenait pas en considération la voie « alternative », dite interlinguistique.

⁴Ces circulaires, du 21 mars 1994 et du 12 avril 1994, sont publiées dans le Journal officiel de la République française sur huit pages denses et complètes.

- Pour l'existence sociale d'une langue artificielle, la valeur interlinguistique est nécessaire mais non suffisante.
- Les problèmes linguistiques au niveau mondial (et maintenant au niveau européen) n'ont jamais été considérés en des termes de justice sociale, et même de justice tout court, comme par exemple la justice en tant que catégorie de droit de l'homme.
- L'espéranto reste actuellement le seul exemple socialement réussi d'une langue construite parce que :
 - elle a attiré par sa réussite tout partisan d'une langue dite artificielle,
 - elle a attiré par sa réussite, dans ses limites, tout partisan et militant de la cause de la «vie alternative» au sens large (les fidèles des religions de l'Oomoto, du Bahā'isme, les juifs laïcs attachés à leur origine, les ouvriers de Lanti, les fédéralistes, les communistes dissidents, les pacifistes, les écologistes, les militants des minorités nationales, les anarchistes, les interlinguistes etc... qui sont, semble-t-il majoritaires dans le mouvement).

L'espéranto atteste par son existence qu'il existe une solution alternative pour limiter la puissance d'une langue nationale au monde, à condition que les nations veuillent bien analyser la perte provoquée par l'unilinguisme au moyen des instruments interlinguistiques. La méthode de l'analyse de la justice linguistique est d'ailleurs la même que celle utilisée pour analyser la justice sociale dans d'autres domaines.

L'espéranto n'est pas la langue qui s'est imposée au monde comme langue universelle, mais elle a créé une population de diaspora interlinguistique qui est, dans le monde, une valeur de civilisation en soi-même.

Bibliographie

Baudoin de Courtenay, J. M.

1907 *Język pomocniczy międzynarodowy*. Cracovie : «Kraj-Przegląd Literacki».

Bernasconi, E.

1977 *Esperanto aŭ interlingva*. La Chaux-de-Fonds : Kultura Centro Esperantista.

Burney, P.

1966 *Les langues internationales*. Paris : PUF.

Chomsky Noam

1980 Teoria lingwistyczna. Dans : *Język w świetle nauki*. Seria Panorama. Varsovie.

Couturat, L. ; Leau, L.

1903 *Histoire de la langue universelle*. Paris.

Drezen, E.

1926 Osnovnïe etapi razvitia idei mejdounarodnogo jazyka. Dans : *Na putiakh k mïejdynarodnoiemou jazykou*. Moscou-Leningrad.

Frank, H. ; Behermann H.

1977 Possibilité de surmonter les barrières linguistiques intra-européennes par un enseignant d'orientation linguistique, ainsi que par l'optimisation du choix d'une langue véhiculaire. Dans : III^e congrès européen sur les systèmes et réseaux documentaires, Luxembourg 3-6 mai 1977. Vol. 1. Munich.

- Héraud, G.
1967 *Peuples et langues d'Europe*. Paris : Denöel. Cité d'après la traduction allemande : *Die Völker als die Träger Europas*. Vienne–Stuttgart.
- Korytkowski, Jerzy
1984 *Pomocniczy język międzynarodowy w Kościele i świecie współczesnym*. Poznań.
- Kuznecov, Sergej
1987 *Teoreticheskie osnovy interlingvistiki*. Moscou.
- Lapenna, Ivo (Lins, Ulrich ; Carlevaro, Tazio)
1974 *Esperanto en Perspektivo*. Londres–Rotterdam : Universala Esperanto-Asocio.
- Lapierre, J.-W.
1988 *Le pouvoir politique et les langues*. Paris : PUF.
- Pardue, David
2001 Uma só língua, uma só bandeira, um só pastor: Spiritism and Esperanto in Brazil. *Esperantologio / Esperanto Studies* **2**, 11–27.
- de Saussure, F.
1975 *Cours de linguistique générale*. Paris : Payot.
- Silfer, Giorgio
1994 La esperantistaro: ĉu lingva minoritato? *Literatura Foiro* **152**, 325–328.
1998 De heterogena movadaro al koherema civito. *Literatura Foiro* **173**, 117–118.
- Sikosek, M.
2000 La Jarcento de Esperanto. *La Ondo de Esperanto* **12**, 3–4.
- Susskin, M.
1990 *Paninterlingwa. Powszechny język międzynarodowy*. Varsovie: PWN.
- Tonkin, Humphrey
2000 Kia kulturo? Kia paco? Kia lingvo? *Esperanto* **9**, 142–143.
- Yacoub, J.
1995 *Les minorités. Quelle protection ?* Paris : Desclée de Brouwer.
- Zamenhof, L.-L.
1948 *Leteroj*. Prezento k komento de G. Waringhien. Vol. I, XVII + 367 pp. Paris : Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Żelazny, Walter
1987 100 jaroj de la socia penso en ligo kun Esperanto. Dans : *Cent jaroj de Esperanto-kulturo. La internacia Jubilea Esperanto-Konferenco* (sous la direction de Ivo Lapenna). Graz : Édition Perspektivo.
1999 Mia esperantismo venas de la civiliza valoro de esperanto. *Literatura Foiro* **182**, 292–299.

Walter Żelazny est docteur en sociologie et maître de conférences à l'École supérieure des sciences sociales et économiques de Rzeszów-Tyczyn (Wyższa Szkoła Społeczno-Ekonomiczna).

Adresse de l'auteur : 51, rue de la Falogne, FR-57070 Metz, France, ou
Wyższa Szkoła Społeczno-Ekonomiczna, ul. Kościuszki 2, PL-36-020 Tyczyn, Pologne.
Adresse électronique : walter.zelazny@libertysurf.fr

Gramatiko naskiĝas el tekstaro

Liu Haitao recenzas verkon de Christopher Gledhill¹

Ni jam havas nemalmultajn gramatikojn pri Esperanto, ekde la 16-regula gramatiko de Zamenhof ĝis la ampleksega PAG (Kalocsay & Waringhien 1985). Ni ankaŭ nemalfacile trovas multajn diskutojn pri specialaj punktoj de la Esperanta gramatiko, precipe de la vortanalizo. La aŭtoroj de tiuj materialoj kutime estas esperantistaj lingvistoj, aŭ pli precize esperantologoj. Tiuj verkoj ĝenerale estas verkitaj en Esperanto, ĉar normale ili celas al la lingvouzantoj, t.e. esperantistoj, same kiel angla gramatiko al angleparolantoj. Se ni konsideras ke Esperanto estas la sola homara lingvo naskiĝinta el planlingvaj projektoj, kiuj nombras ĉirkaŭ 1000 ekde la 2-a jarcento ĝis hodiaŭ (Blanke 1985), ni devas konkludi ke Esperanto rajtas vivi same kiel etnaj lingvoj. Ĝi ankaŭ devas esti priskribata de lingvistoj per tradiciaj kaj modernaj metodoj, kiel ili faras pri etnaj lingvoj.

Dum la lastaj jaroj korpusa lingvistiko (*Corpus Linguistics*) ege evoluis kun la disvastiĝo de komputiloj, per kiuj lingvisto nun povas pli precize, objekte kaj kvante priskribi la lingvon ol en antaŭaj epokoj. “Esperanto estas vera lingvo” (Szerdahelyi 1976); tamen tion oni deklaras nesufiĉa. Se la korpusbazita gramatiko estas pli taŭga kaj objektiva priskribo de etnaj lingvoj, tiam eble ni uzu tiun metodon kaj teknikon ankaŭ pri Esperanto. La recenzata libro estas la unua provo priskribi la tutan lingvon per moderna metodo kaj profesia programaro kaj statistiko.

La aŭtoro estas profesia lingvisto. Li doktoriĝis pri korpusa lingvistiko kaj specialiĝas pri sistema (funkcia) gramatiko kaj teksta analizo. La libro aperis kiel la 190-a volumo en la serio “Languages of the World/Materials”, kiu celas al priskribo de minorataj lingvoj en la mondo. Laŭ la lingva ekologio la priskribo de minorataj lingvoj estas grava ne nur por lingvistoj, sed ankaŭ por la evoluado de la homaro mem. Tial la libro liveras eblecon al lingvistoj, kiuj per ĝi kapablos kompari Esperanton kun aliaj lingvoj per normalaj rimedoj kaj la metodo jam uzita en la serio.

En la enkonduko la aŭtoro indikas “This book aims to provide a linguistic guide for scholars who are unfamiliar with the Esperanto language” (p. 2). Tiel la celata legantaro estas lingvistoj kiuj ne konas Esperanton. Ni jam havis aliajn verkojn pri Esperanto, verkitajn de esperantologoj-lingvistoj, ekzemple Wells (1989) kaj Janton (1989). Tamen la recenzata verko havas celon iom diferencon de ili: ĝi emfazas la ĉefajn trajtojn lingvistikajn de Esperanto por legantaro de lingvistoj. Ni ankaŭ havas kelkajn studojn pri Esperanto kiuj uzas la statistikan metodon, ekzemple vortoftecan esploron (Tišljár 1982, Dietze 1989). Tamen ni ne havas kompletan gramatikon bazitan sur tekstaro, kiu povas doni “immediate access to the most salient characteristics of the language” (p. 2). En la antaŭparolo de la dua eldono la aŭtoro klarigas la

¹Christopher Gledhill. *The Grammar of Esperanto. A corpus-based description*. München: Lincom Europa. (Unua eldono 1998, 100 pp.; dua eldono 2000, 151 pp.)

celojn de sia libro: “At different stages, this book attempts to find a response to the following questions: Is Esperanto a real language? Which linguistic features are unique to Esperanto? Is Esperanto a Latin-based language, or some other category? Does Esperanto evolve, and does this correspond to natural language development?” Sendube, se la libro povas respondi eĉ nur iom al la starigitaj demandoj, ĝi estos signifa kaj valora por la scienca kompreno de Esperanto. Tamen, ĉu la studo de Esperanto estas utila al lingvistiko? Ankaŭ pri tio la aŭtoro faras klaran eldiron: “As a social movement and an invented language system, Esperanto offers the opportunity to explore in a new light such issues as learner motivation, group identity and the formation of norms and standards in language. For the grammarian, Esperanto offers the chance to observe the evolution of morphology and syntax in a relatively unregulated and highly innovative environment.” (*Foreword* de la dua eldono.) Kvankam ni iam vidis similan opinion pri la graveco de Esperanto por la lingvistiko (Duliĉenko 1997, Liu 1997), tiu opinio, kiu nun aperas en libro celanta lingvistojn, estas bonvena.

Ĉu la korpusa metodo havas apartan signifon por planlingvoj? La aŭtoro jesas: “Researchers of planned or artificial languages such as Esperanto are concerned with the extent to which usage may deviate from the original plan, or where innovation may have taken the language in a new direction. The corpus allows the descriptive linguist to systematically address some of these questions.” (Paĝo 2.) Por bone kaj objekte respondi la demandojn pri la evoluado de planlingvo, la korpusa metodo estas pli taŭga ol la tradiciaj, ĉar en ampleksega tekstaro la komputilo povas pli rapide ol homo trovi la bezonataĵojn. Surbaze de komputile eltrovitaj lingvaj faktoj la lingvisto povas pli sisteme kaj kvante esplori kaj priskribi la lingvon.

Kvankam la subtitolo de la libro elmontras la gramatikon bazitan sur la korpuso, la aŭtoro bone kaj multe uzas la ekzistantajn materialojn pri la lingvo; en la referenca parto oni trovas la ĉefajn verkojn eldonitajn en la angla, germana, franca kaj Esperanto. La aŭtoro ankaŭ sekvigas multajn konkludojn el la tradiciaj studoj. Pli precize, li aldonas al la tradicia gramatiko novajn informojn, kiuj venas el la korpusa analizo. Pere de donitaĵoj el la tekstaro ni nun povas kvante kaj ekzakte observi iujn delonge debatatajn problemojn en la lingvo.

La dua eldono estas pli ampleksa ol la unua.² Kiuj estas la diferencoj? La strukturoj de la du eldonoj ne estas tre malsamaj. En la dua eldono la aŭtoro pli profunde detaligas kaj precizigas kelkajn demandojn ol en la unua eldono. Se ni atentigas aldonitajn titolojn en la bibliografio, ni eble komprenas la ŝanĝon. Ĉefe ni vidas Duliĉenko (1990), Hagège (1985), Lins (1988), Lo Jacomo (1981) k.t.p. Ŝajnas al mi ke la aŭtoro atentigas la atingojn el ĝenerala interlingvistika rondo pli ol en la antaŭa eldono.

La artikoloj cititaj de Green kaj Versteegh fariĝas la bazo por ampleksigi la temon pri planlingvoj kaj kreolaj lingvoj. Por demonstri al la legantoj la bazajn atingojn de la korpusa lingvistiko kompare kun sia analizo pri Esperanto, la aŭtoro citas kelkfoje en la dua eldono el la klasika verko de Sinclair (1991). Ekzemple, en la antaŭparolo la aŭtoro diras: “One point raised by reviewers of the first edition, is that the corpus

²La recenzo pritraktas ambaŭ eldonojn; paĝnombro sen plua indiko de citita teksto referencas al la unua eldono, dum citaĵoj el la dua estas markitaj per la vortoj “dua eldono”.

seems to throw up unusual examples. Most corpus analysts see this as an advantage, in that traditional accounts tend to focus on invented examples which themselves are unlikely to occur in running text and which are usually contrived to the extent that they often miss other more underlying patterns of phraseology.” (La dua eldono, p. 2–3.) La frazoj estas atentindaj, ĉar esence korpusa lingvistiko statistike eltiras lingvajn regulojn el vera lingva tekstaro. Ĝi ne similas al la tradicia metodo, en kiu multaj ekzemploj estas kreitaj de la lingvistoj mem por elmontri fenomenojn de la lingvo. En la korpusa metodo lingvistoj nur objekte analizas la lingvaĵojn kreitajn de lingvouzantoj en la praktiko.

La grandeco de la korpuso uzata de la aŭtoro estas 312 130 vortoj en la unua kaj 1 563 500 en la dua eldono – kompare kun nuntempaj etnolingvaj korpusoj tio estas tre malgranda. Strikte dirite la uzita korpuso estas nur “specimena” korpuso. Tamen, ĝi estas multe pli granda ol antaŭaj esperantaj tekstaroj, kiujn uzis Tišljar (1982, 24 280 vortoj) kaj Dietze (1989, 31 699 vortoj). La tekstaro kovras multajn stiltipojn, de gazetaj artikoloj ĝis poemoj de Zamenhof. En la korpuso estas ankaŭ inkluditaj kelkaj tradukoj, kiujn oni kutime ellasas en etnolingva korpuso. Se konsideri ke tradukoj havas specialan lokon en la evoluado de Esperanto, estas necese havigi ilin al la korpuso. Atentindas ke en la tekstaro pli ol kvarono de la materialoj fontas el *Soveta Esperantisto*. Tio certe influas la rezulton de la vorta statistiko kaj la teksta analizo. En la apendico 4 la aŭtoro komparas la subkorpuson el *Soveta Esperantisto* kaj la ĝeneralan korpuson, donante la vortodistribuon de la du tekstaroj. La komparo prezentas al ni stilan malsamecon inter la Soveta kaj aliregiona lingvaj uzadoj. La rezulto eble montras influon de sociolingvistikaj faktoroj en la evoluado de la planlingvo. Ni ankaŭ observas ke la aŭtoro ŝajne ankoraŭ uzas la statistikajn rezultojn de la unua eldono, kvankam tiuj de la dua eldono baziĝas sur pli granda korpuso ol la unua. Eble la rezultoj bazitaj sur la du korpusoj similas, kaj la aŭtoro opiniis nenecese ŝanĝi la jam listigitajn donitaĵojn.

La aŭtoro komencas sian libron je *Background*, kiu konsistas el tri partoj: *Historical development*, *Sociolinguistic status* kaj *The “sixteen rules”*. Laŭ la aŭtoro: “A planned language is a project to develop a new language on the basis of existing natural languages, and whose aim is to create an international medium of communication” (p. 3). Tiu difino estas pli malvasta ol tiu ĝenerale akceptata de interlingvistoj (Blanke 1985); verŝajne ĝi nur kovras la projektojn *a posteriori*. Koncerne la projektojn *a priori*, la aŭtoro preferas nomi ilin “universal languages” kaj ne planlingvoj. Tia nomado oftas ekster interlingvistiko, precipe en anglalingvaj dokumentoj. Tamen la aŭtoro klare distingas tiujn du tipojn de planlingvoj kaj donas detalajn difinojn al la terminoj *a priori* kaj *a posteriori* (p. 19). Pri la nombro de planlingvoj la aŭtoro citas el Janton (1989), ne el pli fidindaj fontoj kiel Duliĉenko (1990), kiu preskaŭ duobligas la nombron de Janton. En la bibliografio de la dua eldono mi povas vidi referencon al Duliĉenko (1990), kiu tamen ne estas menciita en la teksto mem.

Por klarigi kial Esperanto povas elstari antaŭ multaj konkurantoj la aŭtoro mencias unu el multaj faktoroj: “Compared to their systems, Esperanto’s consistent morphology was attractive to learners because it reduced the number of words needed to understand and produce a new text” (p. 3). La aŭtoro opinias ke ankaŭ la personeco de Zamenhof kontribuis al la sukceso de Esperanto.

En la parto *Sociolinguistic status* la aŭtoro resumas la lingvan staton de Esperanto en sociolingvistiko. Li citas multajn vidpunktojn el aliaj verkoj. Tamen, bedaŭrinde, ni ne povas vidi iujn verkojn kiuj eble estas pli aŭtoritataj pri la temoj ol la listigitaj verkoj, ekzemple la biografion de Boulton pri Zamenhof (1960), la historion pri persekutoj de Esperanto (Lins 1988), k.t.p. Kompreneble ni devas kompreni ke la libro ĉefe temas pri gramatiko kaj ne estas dediĉita al sociolingvistika studo. Lins (1988) trovis sian lokon en la dua eldono.

En sia evoluado 100-jara Esperanto ne dialektiĝis: la nunaj uzantoj skribas kaj parolas la lingvon en maniero simila al la uzo de la Zamenhofa epoko. Se Esperanto jam estas viva lingvo kiel uzataj etnolingvoj, kial ĝi ne dispartiĝas en dialektojn? Kio funkcias kiel protektantaj faktoroj? Ĉu 100-jara historio ankoraŭ estas tro mallonga por taksi la evoluadon de la lingvo laŭ la diro de F. de Saussure (1916:111)? Al tiuj demandoj la aŭtoro iom respondas. Li konsideras la rolon de la Akademio de Esperanto en tiu tereno; tamen li kredas ke la diversaj nacilingvaj vortaroj kaj lernomaterialoj ankaŭ estas tre influaj al la evoluado kaj integreco de la lingvo. En la dua eldono li mencias la funkcion de la Fundamento kiel unuigilo de la lingvo. Ni havas bonajn studojn pri la temo, kiel Lo Jacomo (1981) kaj Philippe (1991a). La aŭtoro ne mencias tiujn du elstarajn librojn en la koncerna parto de la unua eldono. Same kiel Lins (1988), Lo Jacomo (1981) havas sian lokon en la dua eldono.

En la unua parto, *Phonetics and phonology*, la aŭtoro atentigas la uzadon de la litero *x* en retroŝto. Per korpusa analizo la verko donas al ni la kvantan distribuon de sonoj (aŭ de literoj) en Esperanto. En 100 000-vorta subkorpuso la plej ofte vidataj literoj estas *a*, *d*, *e*, *k*, *l*, *s*, kiuj ĉiuj aperas pli ol 20 000 fojojn. La statistiko ankaŭ konfirmas ke la sono *ĥ* ankoraŭ vivas, kvankam ĝi proksimiĝas al morto: ĝi aperas nur 28 fojojn. Aliaj ĉapelitaj literoj havas jenajn aperoftecojn: *ĉ* (5945), *ĝ* (2843), *ĵ* (307), *ŝ* (2523) kaj *ŭ* (120). Sendube tiuj donitaĵoj estas utilaj al amantoj kaj malamantoj de la ĉapelitaj literoj.

Se ni komparas la rezulton pri literofteco en tiu ĉi libro kun aliaj statistikoj, ekzemple tiu de Haszpra (MS), kiu resumas statistikojn kaj precize priskribas sian analizon pri literofteco en Esperanto, ni trovos grandan diferencon. La du aŭtoroj ne uzas la saman tekstaron, sed mi dubas ke la tekstara tipo povas tiel grande influi la rezultojn. Gledhill klarigas la diferencon jene: “Mia kalkulo dependas de la unuaj literoj de ĉiu vorto en trionono de la (tiam) tekstaro. Ĝi reprezentas tre simple la proporcion de la alfabeto okupita en la alfabeto listo. Tial mi diras, ke temas pri ‘sample-based’ kaj diras (rapide) en la unua libro, ke tia kalkulo ne inkluzivas la uzadon de ofte mezaj kaj finaj literoj (ekzemple *j* kaj *ĵ*). Tia ofteco tamen utilis por indiki uzadon en tekstoj, krom la ofteco havebla laŭ vortara listo (kun multaj malofte uzitaj vortoj).” (Retletero 2000 02 07.) Tial oni turnu sin al Haszpra (MS) por pli fidela statistiko.

En la dua eldono la aŭtoro analizas la konsonantkombinojn (*consonant clusters*), konkludante: “Although Esperanto is often said to sound like Italian, the range of consonant clusters we have set out above and the many compound words we do not have the space to list here give the language a more Slavic quality” (p. 34).

Lexicon estas nove aldonita parto en la dua eldono. Konsiderante la gravecon de la plej ofte uzataj 100 kaj 1 000 vortoj en ajna lingvo (Crystal 1995:139), la aŭtoro analizas la lingvajn fontojn de la du vortgrupoj. Jen la rezulto: latin(id)a (70%),

nur esperanta (12%), germana (10%), kompromise hindeŭropa (5%), greka (< 2%), baltoslava (< 1%). Evidente, leksike Esperanto estas latinida lingvo. La konkludo iom similas al tiu de Janton (1989) kun kvanta diferenco, kies kaŭzon la aŭtoro tre detale klarigas. Atentindas ke la vortoj de Esperanto mem (ĉefe tabelvortoj) havas altan proporcion en la baza vortstoko de la lingvo.

La aŭtoro opinias ke Esperanto estas tipologie *a posteriori*-sistemo kun kelkaj *a priori*-traĵtoj – alidirite: “Esperanto is usually classed as a naturalistic scheme. There are however a small number of schematic features.” (Dua eldono, p. 38.) Konstraste al tiu eldiro, interlingvistoj ofte konsideras skemismon/naturalismon kiel subdividon nur de la aposterioraj lingvoj. Ekzemple, Esperanto kaj Interlingua estas ambaŭ aposterioraj, sed Esperanto estas pli skemisma ol Interlingua. La aŭtoro ĝuste difinas la du nociojn, sed laŭ mi mise uzas la terminojn. Esperanto ne estas nur planlingvo; ĝi estas ankaŭ viva homara lingvo. Tiel ĝi ankaŭ povas esti klasita laŭ la kriterioj kiuj estas uzataj por etnolingvoj. La aŭtoro atentigas tion; li diras: “In terms of traditional language typology, Esperanto is perhaps best described as an artificial creole, lexically derived from a combination of the main Western European languages but with morpho-syntactic structures that have been systematically generalized” (p. 20). Tie ĉi la aŭtoro starigas similecon tipologian inter Esperanto kaj kreolaj lingvoj. La konkludo estas iom nova kompare kun tiu de la jam klasikaj de Wells kaj Piron, kiuj ankaŭ estas cititaj en la libro. La simileco inter kreola lingvo kaj planlingvo (Esperanto) estis antaŭe traktata de Philippe (1991b) kaj Mühlhäusler (1992). Atentindas ke la aŭtoro uzas pli multajn paĝojn en la dua eldono por pli profunde diskuti la rilaton inter planlingvo (Esperanto) kaj kreolaj lingvoj. Tio fortigas lian vidpunkton pri la temo. Kiam la aŭtoro emfazas la similecon inter la du lingvotipoj, li ankaŭ objektive listigas la ĉefajn diferencojn (dua eldono, p. 42–44). Interese estas legi kiel la aŭtoro resumas la sociiĝan proceduron de Esperanto: “The relationship between Esperanto and Creoles is therefore more abstract: the transformation of Pidgins into Creoles may be reflected in the development of Esperanto from a schematic design to a relatively widely-used language” (dua eldono, p. 42). Indas studi detale ĉu la sociiĝo de planlingvo similas al la kreoliĝo de piĝino. La starigo de la temo estas signifa. Miaopinie ĉi tiu diskuto estas pli profunda kaj sistema ol antaŭaj artikoloj legitaj de mi. Resume, ni povas vidi la opinion pri klasado de la aŭtoro el tri ĉapitretaj titoloj: *Esperanto as a planned language*; *Esperanto as an agglutinating Romance language*; *Esperanto as a Creole*. La plej lastan titolon ni iam vidis en Dasgupta (1997:152).

Laŭ la aŭtoro la morfologio de Esperanto enhavas tri ĉefajn facetojn: leksika, funkcia kaj gramatika. Teorie oni povas kombini senlimajn morfemojn en unu vorto. En la korpuso kvar-morfema vorto tamen reprezentas la tipan limon, ekzemple *poŝt'ofic'ej'o* (p. 21). El unu specimeno de 1 460 substantivoj estas 66 kvar-morfemaj kaj 254 tri-morfemaj kunmetvortoj; la ceteraj ĉiuj estas du-morfemaj kun *o*-finaĵo. En la dua eldono pli multaj paĝoj estas dediĉitaj al la temo *Derivational Morphology*, kiu vere jam multe estas diskutata ekde R. de Saussure, Kalocsay al Schubert kaj Kiselman. La aŭtoro citas nemalmulte el antaŭaj studoj de aliaj aŭtoroj pri la temo, sed ne tiun de Kiselman (1988), kiun estus miaopinie inde citi. En la parto 2.2 la aŭtoro starigas la sekvajn demandojn: “Is the language really as consistent as is claimed by its supporters? Are some parts of Zamenhof’s designs underused? To

what extent do exceptions or innovations impinge upon the rest of the system?” (p. 23). Por elmontri la ŝanĝon de la lingvo en tiu direkto la aŭtoro komparas la nunan komputile faritan rezulton kun antaŭa, mane farita konkordanco (Wackrill 1907). Estas konate ke adjektivo ofte povas esti esprimata kiel aktiva verbo; pri tio la statistiko indikas ke la plej altfrekvencaj adjektivoj semantike esprimas la abstraktajn statojn pri “potential, necessity or quantity”, kiel *fieras*, *fidelas*, *kapablas*, *necesas*, *sufiĉas*. La analizo estas utila al la komprenigo de la verbigo de adjektivo.

Kvankam oni ekuzas formojn kiel *-intas*, *-antas*, *-ontas* kaj *-itas*, *-atas*, *-otas*, la korpuso montras ke la tradicia formo *esti* + participo (aktiva aŭ pasiva) ankoraŭ estas uzata pli ofte. La statistikaj donitaĵoj donas la sekvan ordon por 7648 pasivaj participoj: *-ita* 72,3%, *-ata* 26,9% kaj *-ota* 0,8%.

La afiksaro estas produktiva elemento en Esperanto. Per la korpuso oni povas trovi la uzoftecon kaj stabilecon de la oficialaj afiksoj. Ĉu novaj afiksoj aperas? Ekzemple: nemalmultaj malŝatas la uzadon de prefikso *mal-*. Tamen ĝi ankoraŭ estas la plej multe uzata prefikso (3 116). Ĝia ofteco estas multe pli granda ol la dua plej ofta, *dis-* (120). El la tekstaro ankaŭ eltiriĝas kelkaj neoficialaj prefiksoj: *ĉef-*, *ĉiu-*, *tiu-*. Ili povas esti konsiderataj kiel pseudoprefiksoj; kvankam en la tekstaro ili funkcias multfoje prefikse, ili iuflanke ne estas tute similaj al tradiciaj prefiksoj. Atentindas ke la nombro de novaj sufiksoj estas multe malpli granda ol iliaj prefiksaj gefratoj pli aĝaj. Se kompari la rezultojn kun tiuj de Dietze (1989) kaj Tišljär (1982) pri afiksa distribuo, ili montriĝas similaj.

La tabelvortoj estas grupo da vortoj *a priori*: ili konsistigas altgrade artefaritan elementon en la artefarita lingvo. Tamen, laŭ la statistiko la tabelvortoj jam fariĝis nedisigebla integra parto de la lingva sistemo de Esperanto. La fakto indikas ke en homara lingvo oni povas enmeti artefaritajn elementojn, kiuj povas bone integriĝi en la lingva kerno. Tio estas signifa ankaŭ por la lingva planado de etnaj lingvoj. La plej ofte uzataj tabelvortoj estas: *kiu*, *tiu*, *tio*, *ĉiu*.

Laŭ la analizo de la aŭtoro en la tria ĉapitro, *Syntax*, Esperanto ne povas esti simple klasita el sintaksa vidpunkto en iu lingvotipo de la jam ekzistantaj etnolingvaj sistemoj, kvankam la sintaksa strukturo de Esperanto estas influata de ĝiaj uzantoj parolantaj diversajn etnolingvojn. Jen du ĉefkaŭzoj: 1. “a tolerant stylistic consensus was consciously manufactured within the community itself”; 2. “the streamlining effect of certain universal principles may serve to generalize any conventions that were established” (p. 50). Tie ĉi la aŭtoro denove mencias la similecon inter Esperanto kaj kreolaj lingvoj.

Laŭ la teorio de lingva universaleco la vortordo estas unu el la plej gravaj kriterioj por klasigi lingvon tipologie. Ĉu Esperanto estas lingvo kun libera vortordo, kiel dirite de multaj? La libro donas al ni kvantan respondon. En statistikita specimeno de 1045 okazaĵoj la vortorda distribuo estas: SVO 67,5%, OSV 24,7%, SOV 4,9%, OVS 2,6%, VOS 0,3%, VSO 0,1%. La donitaĵoj indikas ke la ordo SVO estas multe pli ofta ol la aliaj. Statistike Esperanto apartenas al la lingvotipo SVO; tiu ordo estas la nemarkita vortordo. Tamen, pere de sintaksa markilo, se necese, oni povas esprimi sin en aliaj vortordoj. Tial eble estas pli taŭge nomi Esperanton fleksie vortorda lingvo ol lingvo kun “libera” vortordo.

La aŭtoro uzas la nocion kaj metodon de Halliday (1985) por detale analizi la propozician strukturon, substantivan vortgrupon, verban vortgrupon kaj prepozician

vortgrupon. La analizo estas sistema kaj scienca. Tiuflanke la korpuso klarigas iujn interesajn fenomenojn, ekzemple: artikoluzado; ĉu ekzistas vortoj kiuj povas funkcii kiel la neekzistanta nedifina artikolo?; ĉu adjektivo estu metita antaŭ aŭ malantaŭ substantivo?

Frazeologio estas la ĉeftemo de la lasta ĉapitro; simile al etnolingvoj la studo de tiu temo verŝajne estas subevoluinta ankaŭ en Esperanto. La recenzata verko proksimiĝas al la demandaro de tri flankoj: *Lexical paradigms*, *Idiom structure* kaj *Cultural reference*. Ĉar *Collocation* estas unu el la gravaj partoj de korpusa lingvistiko, ni povas kompreni kial la aŭtoro elspezas kelkajn paĝojn por la temo. Estas interese kiam ni vidas la rezulton analizitan el la korpuso pri “neologismo” kaj “kunmetaĵo”, t.e. “naturalismo” kaj “skemismo” en vortkreado. La aŭtoro unue eltiras kelkajn “neologismo/kunmetaĵo”-parojn el la artikolo *La evoluo de nia poezia lingvo* (Kalocsay 1963); poste li serĉas kaj listigas la oft ecojn de la vortoj en la korpuso. Refoje ni vidas atentindan statistikon: en la ĝenerala grupo la neologismoj estas pli preferataj ol kunmetaĵoj, sed en la alia grupo, kun celo forigi prefikson *mal-*, la kunmetaĵoj uzantaj *mal-* pli multe preferatas! Pri tio la aŭtoro konkludas ke “Esperanto appears to fully exploit both systems: morphological derivation is widespread but does not preclude neologisms while some forms of morphological derivation happen to be more fundamental than others” (p. 75). Ŝajnas al mi ke ankoraŭ daŭras la lukto inter skemismo kaj naturalismo; tamen tio estas normala por ĉiuj uzataj lingvoj. La lingvo evoluis/as/os laŭ siaj leĝoj.

Kiel kroma produkto la aŭtoro donas en la apendicoj vortoftecan liston de la unuaj 100 vortoj, distribuon de vortformoj (substantivo, verbo, adjektivo, ...) kaj vortoftecan komparon inter la revuo *Soveta Esperantisto* kaj la “ĝenerala Esperanto”. Tiuj donitaĵoj ne rekte rilatas al la gramatiko, sed ankaŭ estas utilaj por kompreni la tutan aspekton de Esperanto. Mi komparis la rezulton kun Dietze (1989) kaj Tišljär (1982): la statistiko estas baze simila.

Kiel kutime, en la libro ankaŭ ekzistas kelkaj mispresaĵoj kaj malzorgaĵoj, kvankam la dua eldono jam plejparte forĵetis ilin. Bedaŭrinde ankoraŭ kelkaj restas, ekzemple: Chaux-le-fonds (korektite: La Chaux-de-Fonds); strikte dirite René de Saussure eble ne devas esti vidata kiel lingvisto (dua eldono, p. 4); Large kaj Eco ne estas esperantistoj (dua eldono, p. 7). Cetere, ke en la apendicoj pri vortofteco ekzistas kelkaj strangaĵoj, ekzemple: *Ô*, *C*, *L*, *Ŭ*, *Ĭ*. Ni ne povas trovi indeksojn, kiu certe estus utila, precipe en la pli ampleksa dua eldono.

Resume, la libro science, moderne kaj precize analizas kaj priskribas la strukturon de Esperanto. En 150-paĝa libro la aŭtoro evidente ne povas detale trakti ĉiujn gramatikajn demandojn de la lingvo. Tamen ĉiuj gravaj kaj bazaj trajtoj estas konsiderataj. Pere de statistikaj donitaĵoj ni nun havas pli klaran kaj kvantan komprenon pri kelkaj longe debatataj punktoj. Ĝi estas leginda por ĉiu kiu serioze uzas kaj studas Esperanton. Mi kredas ke ne ekzistas io simila pri Esperanto tiel taŭge uzebla por informi lingvistojn. Tamen ĝi utilas ne nur por lingvistoj, sed ankaŭ por esperantoparolantoj.

Referencoj

- Blanke, D.
1985 *Internationale Plansprachen: Eine Einführung*. Berlino: Akademie-Verlag.
- Boulton, M.
1960 *Zamenhof, Creator of Esperanto*. Londono: Routledge and Kegan Paul.
- Crystal, David.
1995 *The Cambridge Encyclopedia of Language* [Traduko en la ĉinan]. Pekino: Social Science Press of China.
- Dasgupta, P.
1997 Toward a dialogue between the sociolinguistic science and Esperanto culture. En: H. Tonkin, *Esperanto, Interlinguistics and Planned Languages*. Lanham, Maryland: University Press of America, pp. 141–171.
- Dietze, J.
1989 *Frequenzwörterbuch Esperanto-Deutsch: Die meistgebrauchten Wurzeln der Esperanto-Literatursprache* (Wissenschaftliche Beiträge F96). Halle (Saale): Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg.
- Duličenko, A. D.
1990. *Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki*. Tallinn: Valgus.
1997 Esperanto: A unique model for general linguistics. En: H. Tonkin, *Esperanto, Interlinguistics and Planned Languages*. Lanham, Maryland: University Press of America, pp. 67–69.
- Hagège, Claude
1985 *L'homme de paroles*. Parizo: Fayard.
- Halliday, M. A.
1985 *An introduction to functional grammar*. Londono: Edward Arnold.
- Haszpra Ottó
MS *Literofteco en Esperantaj tekstoj*. Manuskripto, 13 pp. Publikigota en: Fiedler, Sabine; Liu Haitao (Red.): *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zur Interlingvistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*. Dobřichovice (Prague): Kava-Pech 2001.
- Janton, P.
1989 *L'espéranto*. (Tria eldono.) Parizo: Presses Universitaires de France.
- Kalocsay, K.
1963 *Lingvo Stilo Formo*. Budapeŝto: Librejo Pirato. (Unua eldono 1931.)
- Kalocsay, K., & Waringhien, G.
1985 *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Pekino: CHEL.
- Kiselman, C. O.
1988 La problemo de duarangaj derivaĵoj en Esperanto. En: *Akademiaj studoj 1987* (red. Rüdiger Eichholz). Bailieboro: Esperanto Press, pp. 65–75.
- Lins, U.
1988 *La danĝera lingvo*. Gerlingen: Bleicher.
- Liu Haitao
1997 Jiyu gonglihua fangfa de yujiyuyanxue tansuo [Interlinguistic studies based on axiomatic principles]. En: *Waiguoyu [Foreign Languages]* **6**, pp. 25–30.
- Lo Jacomo, François
1981 *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'esperanto*. Pisa: Edistudio.

Mühlhäusler, P.

- 1992 Shared properties of pidgins and artificial languages. En: Tom Dutton; Malcolm Ross; Darrell Tryon, *The language game: papers in memory of Donald C. Laycock*. Canberra: Pacific Linguistics (C-110), pp. 283–290.

Philippe, B.

- 1991a *Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto*. Konstanz: Hartung-Gorre.
1991b *Kreolsprache und Plansprache*. Vieno: IEM.

Saussure, F. de

- 1916 *Cours de linguistique générale*. Parizo: Payot.

Sinclair, John McH.

- 1991 *Corpus, Concordance, Collocation*. Oksfordo: Oxford University Press.

Szerdahelyi, I.

- 1976 *Jes, Esperanto estas lingvo. Respondo al Spang-Hanssen*. La Chaux-de-Fonds: KCE.

Tišljar, Z.

- 1982 Pri la morfemfrekencaro en la parolata Internacia Lingvo. *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft* **23** (1), 40–47.

Wackrill, A. E.

- 1907 *Konkordanco de Ekzercaro*. Parizo: Hachette.

Wells, J. C.

- 1989 *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*. (Dua eldono.) Roterdamo: UEA/CED.

Liu Haitao estas altgrada inĝeniero pri informadiko kaj esploras pri interlingvistiko kaj komputila lingvistiko. Liaj ĉefaj esplorinteresoj inkludas la bazan demandaron de interlingvistiko kaj ĝiajn rilatojn kun aliaj branĉoj de lingvistiko kaj aliaj sciencoj.

Adreso de la aŭtoro: Jisuanji Zhan, Qinghai Lü Chang, Xining, Qinghai, CN-810108, Ĉinio

Retadreso: htliu@iname.com

URL: <http://htliu.163.net>

Ricevita 1999 07 28. Akceptita 1999 09 07. Aldono ricevita 2000 02 14. Reviziita versio ricevita 2000 06 19

prezentas

Nova!

Kaoso en Budapeŝto. Historia, persona atesto pri la jaro 1944, kiam Hungario estis okupata de nazioj. Nina Langlet, filino de la fama esperantisto Nikolaj Borovko, kaj ŝia esperantista edzo Valdemar Langlet savis milojn da homoj en brulanta Budapeŝto. Serio Kargo, Varna 2001. 9,30 EUR.

Nova!

Havenoj. Kolektaĵo de poezio kaj prozo de multfoje premiita aŭtoro Mauro Nervi el Italio. Klara, sonora poezio kaj bela prozo karakterizas la verkon. Serio Kargo, Varna 2001. 6,90 EUR.

Serio Kargo

Lando malekzista. Poezio de la fama finnlanda modernisma poetino Edith Södergran (1892–1923) en traduko de Sabira Ståhlberg. Poezio, kiu iras rekte en la koron. Serio Kargo, Varna 1999. 9,30 EUR.

Politiko

Vespermesaĝoj. Persona atesto de junulo pri la bombado de Jugoslavio en 1999. Aktualaj, skuaĵaj retpoŝtaj mesaĝoj de Zoran Ĉiriĉ kun mapo, interkonsentoj pri Kosovo k.a. Varna 2000. 6,00 EUR.

Filozofio

Libere de la konoj. Filozofio de J. Krishnamurti, kiu celis ke homoj liberiĝu de t.n. subinfluoj. La verko prezentas liajn esencajn pensojn pri la homaro, pri la mondo kaj pri la vojo al liberiĝo. Tradukita de Yves Bachimont. Varna 1999. 7,80 EUR.

Vojaĝo

Malantaŭ la muro – puzleroj pri Ĉinio. Vojaĝoj kaj impresoj de Sabira Ståhlberg en Ĉinio. Eldonis IKL, Tokio 1994; nun aĉetebla ankaŭ ĉe Bambu. Nova prezo: 4,80 EUR.

Mendu

ĉe via libroservo aŭ rekte de la eldonejo Bambu Ltd, P. K. 405, BG-9000 Varna, Bulgario; rete: <bambu@mailroom.com>. Por libroservoj kaj mendantoj de pli ol 3 ekzempleroj triona rabato.

Aperis ampleksa vortaro esperanta-germana

Ebbe Vilborg recenzas vortaron de Erich-Dieter Krause¹

Aperis la granda vortaro esperanta-germana de Erich-Dieter Krause – verko longe atendata kaj arde dezirata, ĉar la samspeca antaŭulo, Butin & Sommer, *Wörterbuch Esperanto-Deutsch*, datumas de la 1950-aj jaroj. La kompilinto estas profesia lingvisto (profesoro pri la indonezia lingvo en la Universitato de Lepsiko) kaj leksikografo, jam konata en la esperantista mondo pro sia germana-esperanta vortaro de 1983. La aktuala verko estas tiel ampleksa (80 000 kapvortoj), ke oni, por trovi kompareblan objekton, devas sin turni al *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV)* aŭ al la *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana* de Wüster (1923–1929). Kiel laborkvanto plenumita de unu persono ĝi estas supermezura, klarigebla nur per diligenta kolektado kaj registrado dum pluraj jardekoj.

Aspekto

La verko sin prezentas en inda vesto: firma bindo malhele griza, tre klara preso (iom malgrandaj litertipoj); formato iom malpli granda ol A5.

Fontoj

La kompilinto donas dupaĝan liston de uzitaj fontoj (entute 71) – tre bona faro, tro ofte neglektita en esperantaj vortaroj. Sed la ĉefa fonto estas liaj sliparoj bazitaj sur tridekjara esploro kaj analizo de gazetoj, revuoj kaj beletro; krome materialo de radiodisaŭdigoj kaj leksemoj kolektitaj dum Esperanto-renkontiĝoj kaj konferencoj (p. XIII).

Principoj

La antaŭparolo nenion sciigas pri la principoj aplikitaj dum la ellaborado; ĝi impresas preskaŭ (*sit venia verbo*) kiel reklamteksto. Laŭ mia kompreno la gvida principo de Krause estis: trakti Esperanton strikte en la sama maniero kiel ajnan etnan lingvon. Tio signifas ke kelkaj informoj kiujn ni al kutimiĝis trovi en Esperanto-vortaroj mankas: ne troviĝas indikoj pri fundamenteco aŭ oficialeco de vortradikoj nek informoj pri Zamenhofa lingvouzo (la siglo *Zam* tamen aperas ĉe proverboj), eĉ ne pri eventualaj neologismoj. Tio ankaŭ signifas ke Krause atribuas al la vortoj vastan gamon de diversaj stilniveleoj kaj uzoftecoj, kiuj ne ĉiam estas facile konstateblaj en la fakte uzata Esperanto: *derb* (kruda), *poet* (poezia), *pop* (populara), *salopp* (nezorga, senĝena), *selt* (malofta), *umg* (en la ĉiutaga lingvo), *vulg* (vulgara). Analoge la “mal-mal-vortoj” (mi prunteprenas la terminon de Jorge Camacho) estas traktataj

¹Erich-Dieter Krause. *Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. Hamburg: Helmut Buske Verlag, 1999. XIV + 882 pp. ISBN 3-87548-193-3. Prezo ĉ. 35 EUR.

diversmaniere. Kelkaj aperas simple sen indiko (*fajna, febla, frida, leĝera, obskura, magra, trista*), aliaj kun indiko *bes fachsprachlich* ‘ĉefe faklingva’ (*dura, liva, kurta*) aŭ *poet* (*olda, turpa*). Mankas *mava*.

Mi ne negas ke la aplikata metodo (sinkroneco, egaligo al etnolingvaj vortaroj) povas esti sukcesa ĉe prezento de Esperanto al neesperanta publiko.

Vortaranĝo

